



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.distrilo.com/esperanto/k44.htm>

<http://esperanto.dragonfire.net/44.htm>

*Ĉu NATa interveno finis
ethan purigadon?*

Himno de Esperanto



Teroristo aktualiĝas


Pri la arto paroli



Trobadoroj

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezas Martínez,**
c/ Jabonerías, 6-3ºD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Vicprezidanto: ankoraŭ neniu oficas

Sekretario: **José Pina Tuells,**
c/ Stª Teresa, 22-2º CD,
ES30005 MURCIA

Kasisto: **José María Bernabéu Franco**

Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Libroservo: **Nicolás Gil Carballo,**
Apartado 305
ES24080 LEÓN

Redaktoro: **Jesuo de las Heras,**
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la
nova konto n° 1302 0412 86
0022655110 en libreta de Caja
Postal. Sen aldona kosto. La abono
kostas 1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn.
Kvintancon oni ricevos.

Pretigas la Kajeron:
Provkorekto: José Pina Tuells,
Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.

Kovrilo: Denove NATO montris, ke milito estas malbono, ĉefe se *kruca*.

Enhavo

Redaktore	3
Informoj de la prezidanto	4
Kongresoj:	
72-a de SAT en Karlovy Vary	5
Berlino 99	8
Recenzoj:	
<i>Higiĝeno de l' murdisto</i>	9
<i>La infanoj en la arboj</i>	9
<i>Memevoluo kaj dancantaj figuroj</i>	10
<i>Raportoj el Japanio.</i>	10
<i>Eraroj kaj sinperdoj</i>	10
<i>Esperanto malsanktigita</i>	11
Eseo: <i>Pri la arto paroli</i>	13
Himno de Esperanto	15
Nova konceptoj kaj antaŭjuĝoj	17
La komenco de la milito	22
La trobadoroj	32
Enkonduko en muziko: <i>Instrumentoj</i>	39
Mi ŝatas virinojn	40

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni povas reprodukti artikolojn, kondiĉe ke oni citu la originon.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Redaktore:

Je la lasta **Kajeroj** aperis erara manĉeto, kiu prezentis ankoraŭ eksprezidanton María del Mar



Guirao kiel prezidanton, kaj nian veran prezidanton, K^{don}

Cabezos, kiel administran laboranton. Mi pardonpetas pro la misfaro, kiu rezultis el teĥnika eraro. Mi jam fiksas la aferon.

La lastan kongreson de la Hispana Esperanto Federacio mi ne povis partopreni. Estis aranĝite, ke mi prelegu pri gitaristo **Francisco Tárrega Eixea**, eminenta kastelĵonano; sed bedaŭrinde mi ne povis atendi pro personaj kialoj. Tamen, se leganto volas aŭskulti la prelegon, mi povas sendi ĝin kompakto-diske kontraŭ 6 eŭroj (10 por eksterlando), inkluzive de sendokostoj. Tiu kompakto-disko ankaŭ enhavas la TTT-paĝon **Esperanto España**, kiu entenas la virtualan version de **Kajeroj el la Sudo** de numero 29-a ĝis ĉi tiun, kiun vi legas. Se vi jam havas la kompaktan diskon, kiun ni pretigis okaze de

la unua kongreso de HALE, vi havas sufiĉe bonan ideon pri la afero, kvankam la enhavo de la prelego estas, kompreneble, alia.

Gravaj novaĵoj estas la Kongresoj de SAT kaj UEA, kiujn mi vizitis ĉi somere. Ni informas je niaj paĝoj pri ili.

Kvankam ĉi *Kajero* dikiĝis nekutime, kelkaj artikoloj devis resti ĉe inkejo ĝis la venonta numero. Vio trovos ilin jam en <http://www.districto.com/esperanto/k45.htm>. Bonan legadon!

Esperanto ĉe Barcelono!

Organizita de Kultura Esperantista Asocio kaj kune kun la Aŭtonoma Universitato de Barcelono (lokita en la urbeto Bellaterra, kvin kilometroj for de Sabadell), oni komencos esperantan kurson ene de aŭlo de la Fakultato de Ekonomiaj Sciencoj, de la 19-a de oktobro de 1999. Tiu-ĉi kurso, la unua organizita en kataluna universitato, estos instruita dum tri monatoj, kaj ĝi entute lekciros tridek horojn. Ĝin gvidos la KAE membroj Martí Guerrero Cots kaj Gerardo Rodríguez Gil. Antaŭ la koncernaj formalizaĵoj la universitato koncesios je la fino de la kurso de Esperanto TRI kreditojn al ĉeestintaj lernantoj.

*José María Galofré Domingo,
prezidanto de KAE*

Informoj de la prezidanto

Karaj haleanoj:



Dum multaj kongresoj de SAT la partopreno de haleanoj estis malalta. Tamen en la lasta kongreso la partoprenaro de haleanoj estis tre alta, entute 10 haleanoj partoprenis la kongreson de **Karlovy Vary!** Se HALE estis en krizo, mi opinias, ke la krizo jam fiaskis.

La partopreno en la diskutadoj dum la kunvenoj de la Kongreso de **SAT 99** estis tre alta por la haleanoj; ekzemple:

- 1 La kamarado Marteno Bustín Benito proponis ŝanĝon en la Statuto de SAT. La propono estis aprobita, kaj en la venonta kongreso de *Moskvo 2000* ĝi havos sian finan redaktoformon. Tiu aprobo signifas, ke ekde nun ne nur tiuj membroj de SAT loĝantaj en grandaj urboj, kie estas pli ol ok anoj de la asocio, rajtas kandidatiĝi —kaj esti elektitaj— anoj de la

Plenumkomitato de SAT. Tio estas pligrandiĝo de interna demokratieco en la Sennacieca Asocio Tutmonda. Ni festu kaj ĝoju pri tio.

- 2 La kamarado Jesuo de las Heras apogis la utilecon de *Interreto*. Li diris, ke *Interreto estas la papiro de la 21-a jarcento*, kaj ke *endas, ke oni lernu skribi sur tiu nova papiro. Tiuj, kiuj ne sukcesos lerni fari tion, estos la analfabetoj de la 21-a jarcento*. Parto de la ĉeestantaro ridetis, parte kortuŝite, parte mensutuŝite... Al la demando el la prezidanta tablo *kiu havas interretan aliron?*, iom pli ol 50% respondis jese.



Kio okazas en SAT? Ĉu oni timas komputilon?

Tamen, HALE vetas por *interreto*, kaj tiucele ni havas grandan paĝon TTT-an, kies konsulto estas tute senpaga por ĉiuj kaj kies adreson troviĝas ĉe la kovriloj de ĉi tiu magazino.

Kamaradece,

Johano

Kongreso 72-a de SAT en Karlovy Vary, Ĉeĥio

La dimanĉon 25-an de julio komencis la Kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda per oficiala bonveno de la prezidanto, Ivo Pejrolt, kaj salutvortoj de kamaradoj el diversaj asocioj fakaj kaj regiono en Hotelo Thermal. En la foto oni vidas Martenon Bustín salutante nome de ni.

Post interesa jarkunveno de Taneŝ (naturamikoj esperantaj) ni havis la okazon aŭskulti interesan prelegon fare de Stanjo Chrdlová pri *Banloka tradicio en Karlovy Vary*. Ŝi klarigis, ke la ĉefaj malsanoj kuracitaj per tiuj banoj estas tiuj rilatitaj al digestaj organoj, metabolaj (kiel diabeto, grasdikeco kaj polagro), kaj ankaŭ tiuj rilataj al moviĝaj organoj, kiel vertebro kaj artroj. La metodoj kuraci ilin estis laŭhistorie: turmentigaj banoj, piramidaj kuracprocedoj (trinkado) kaj kompleksa banloka kuracado. Krome estas novaj metodoj, kiuj inkluzivas biskvitoj kaj likvoro beherovska.



Stanjo
prelegas
pri banoj.

Je la fino de tiu prelego, kamaradino Lucie Karešova parolis pri sia profesia



agado pri *Homoj mense handikapitaj en socio fine de la 20-a jarcento*. Ŝi diris, ke la plej alta kondiĉulo inter ili havas samajn rajtojn kiel ni, sed la averaĝa mensaĝo de tiuj homoj estas 6 jaraĝo. Ŝi estras domon kie oni klopodas eduki 10 handikapulojn por ke ili povos havi sendependan vivon, kvankam ne ĉiuj povas atingi ĝin. Helpas parencaj organizacioj kaj kluboj de homoj kun mensaj malsufiĉo.



Lucie
Karešova

Lundon 26-an de julio komencis la Laborkunsidoj de SAT. La kunsidoj estis kvar laŭ la kongresaj tagoj po tri horoj. Ne mankis debato kaj kvazaŭ prelegaj demandoj, kaj la tagordo estis antaŭe publikigita en la organo de SAT, *Sennaciulo* en junio kaj julio. El la proponoj submetitaj al la ĉeestantaro nur sukcesis tiu de Marteno Bustín Benito pri modifo de la SAT Statuto rilate al neebleco prikandidatiĝi

anoj el malgrandaj rondoj de SAT. Estis grava diskuto, ĉu estas demokrate, ke oni devas havi retaliron por kunveni *virtuale* per Interreto, kaj finfine oni agnoskis, ke, kvankam ne tute perfekta solvo, ĝi estas pli efika ol tiu, ke nur kamaradoj loĝante en urboj kies aro da satanoj estas sufiĉe granda povus eventuale aparteni al Plenumkomitato.

Kep Enderby parolis la lundon posttagmeze pri *Ĉu eĉ murdinto meritas ricevi justecon kaj ĉu la socio povas toleri tion?*, kaj je la oka kaj duono vespere ni aŭskultis esperantan koncerton de kantistoj **Elena Puchova, Galina Stanešnikovoj, Katerina Kudkliková kaj Miroslav Smička.**

Mardon la 27-an je la oka horo vespere, Jean Luc Tortel prelegis pri *Trobadoroj*, kies kompletan tekston oni povas legi ĉe paĝo 35-a de ĉi tiu **Kajero**. Je la naŭa horo, kamarado Alex Ĥarkovsky parolis pri *Jeroŝenko: unika mondvojaĝanto, verkisto kaj instruisto.*

La sekvintan tagon okazis tutotaga ekskurso al Prago, gvidata de Lucie Ka-

reŝova kaj Josef Vojáček; kaj samtempe estis alia ekskurso pieda al Kastelo de Locket, gvidata de Jana Melicharková, Miroslav Krupka kaj Andrea Ondrušková. Interesan prelegon ni aŭskultis jaŭdon 29-an je la 16:00-a fare de Ivo Pejrolto: *La longa lukto de sendokumentuloj en Francio*, sekvita de surgrundaj konsideroj de Gilberto Ledon,

Jen la Kongresa Loka Komitato, je la maldekstro de Prezidanto Ivo Pejrolto.



kiu prelegis pri *Aktualaj faktoj de ekonomika, socipolitikaj karakteroj*. Tiuj, kiuj ne antaŭe legis la interesan serion de artikoloj de la preleganto en **Monato** kaj aliaj esperantaj magazinoj eble trovis ĝin tro densa, sed la postuloj de kamarado Ledon estis tre logike prezentataj, kvankam entute ne lasis

multe da loko por optimismo: tiu nuna estas klara vojo al nia sindetruo kiel biologia speco. Tiun tagon ni ankaŭ havis la okazon aŭskulti pri laboristaj problemoj en Ĉeĥio, ĉe prelego de Pavel Rusiĉka interpretita de Petro Chdrle kaj Lucie Karešova rekte el la ĉeĥa lingvo. La vendredon 30-an ni havis la bankedon, kaj poste ni ĝuis la folkloran prezentadon de



Gekantistoj Kudkliková kaj Smyĉka kantis ĉe salono de Hotelo Thermal

sakfluta muziko de Domazlice. Post sia koncerto kaj dancado folkloraj, ili daŭre ludis, por ke ni ĉiuj dancu ĝis meznokto.



Je la naŭa vespere oni fermis la kongreson. Notindas ankaŭ, ke dum la tuta kongreso oni aŭdis kanti en Esperanto al spontanea grupo de SAT-anoj gvidataj de Carmen **Segarra**, Danuta **Tudaj** kaj Neil **Bronstein**.

La sabaton 31-an estis adiaŭa tago. Kelkaj el ni eniris aŭtobuson, kiu portis nin rekte al la kongresejo de la 84-a Kongreso de la Universala Esperanto Asocio, en Berlino.

Ĉi tiu estis la unua fojo, kiam mi ĉeestis kongreson de SAT. Mi vidas, ke estas

multe da interna debato, kaj intereso pri la asocio kaj deziroj plibonigi ĝin, kaj la partoprenado aktiva en la diskutoj estas tre alta. Nur 166 homoj partoprenis la

kongreson, sed preskaŭ ĉiuj kongresumis aktive. Ne nur temis pri paroli en Esperanto, ankaŭ oni celis labori per Esperanto. Tial, mi rekomendas al ĉiuj kamaradoj, kiuj povas, ĉeesti la kongresojn de la Sennacieca Asocio Tutmonda.

Mi volas danki publike la subtenon kaj kunlaboron de

fotistoj **Odile Maseron** kaj **Rémy Bouchet**, kiuj bildigis mian supraĵan rakonton de la kongreso. Ankaŭ menciendas la brila laboro kaj pretigado fare de la Loka Kongresa Komitato, kiu konsistis el Petro Chrdle, Stanjo Chrdlová, Jana Melichárková, Lucie Karešová, Zdenek Pluhaf, A. Klementová, Miloš Bloudek, Jaroslav Kruptka kaj Andrea Ondrišková, kiuj ebligis, ke la kongreso okazis.



Ekzemplo de afableco ĉe SAT kongresoj...

Berlino 99

La lasta akto de la kongreso de SAT en Karlovy Vary (*Karlabano* en Esperanto) estis unu-voja ekskurso al Berlino, kun halto en Dresdeno —urbo de la 4-a kongreso de Esperanto). Vespere, ni atingis Me-



Messedamm: la kongresejo

ssedam-on, grandan kunvenejon kie la 84-a Kongreso de la Universala Esperanto Asocio okazis. Jam estis la *interkona vespero*, do la etoso estis festa kaj amuziga. Post taŭgaj indikoj pri mia restadejo, mi forlasis la kunvenejon por trovi la dormejon.



Ĉiu matene, mi trapasis la urbocentron irante al la kongresejo. La promenado ja vere indas: Bundensalle, Johakimo Strato, Kantstrato... Berlinanoj kutime uzas la metroon, kaj pro tia ĝentilajlo ilia mi havis tiujn belajn stratojn nur por mi mem. La vetero estis ne tro varma, konsiderante, ke mi venas el la suda parto de Hispanio. Pro tio ne miru, ke la *liberan tagon* mia tasko estis promenado tra tiu urbo, kies ĉefa monumento estas la urbo mem.



Brandenburga pordego, iama pordo al Orienteuropo...

La kongreson de UEA partoprenis 2 600 samideanoj, kaj eble pro tio ĉiam estis kvar samtempaj aferoj, do oni devis elekti,

renoncante al interesaj aferoj. Ekzemple, la unuan tagon, post la *solena malfermo* estis samtempe kunveno de verkistoj, kaj la enkonduko al Kongresa Temo ekde la 14:45 horo, sed je la 14:30 komencis dancado de baha grupo *Diverseco*, kiun logike mi ne povis vidi, ĉar mi volis ĉeesti la enkondukon al Kongresa temo, fare de Vilmos Benczik. La temo estis *Tutmondiĝo, ĉu ŝanco por paco?* Li diris, ke ĝi *estas unu el la plej determinantaj aferoj de nia temo. Tutmondeco nepre movigas la mondon. Ĉu tutmondiĝo rezultigos pacon? Kono estas nepra paŝo al paco. Sekve, ni esperantistoj devas aŭdigi nian voĉon en tiu tutmondiga procezo.*



Domo de la Kulturoj de la Mondo

Dum la malfermo estis dancado de grupo bahaana, kaj poste la kutima salutado de diversaj grupoj esperantistoj laŭ siaj naciecoj. Ankaŭ SAT salutis kiel sennacia grupo, kvankam ĝi ne estis agnoskita tiele; multaj samideanoj verŝajne kredis, ke ili salutis nome de iu nova lando, aŭ faka grupo. Por la venonta jaro oni devus sciigi precize tion, laŭ mia opinio. Eĉ povus saluti sengrava sennaciano, ne la prezidanto—kiu eble ankaŭ povas saluti nome de *memstara asocio* ne ueana—, nome de esperantistaj *sennaciuloj*.



Soveta honormemorejo.




Rivero Spree

Recenzoj

Nesuspensa novelo pri krimo renversita

Higiène de l'assassin estas la unua romano de juna francino Amélie Nothomb. La romano furoris en Francio kaj Belgio baldaŭ post sia aperigo.

Armela le Quint kaj Ĵak le Puil —fama redaktoro de *La Kancerkliniko*— ĵus tradukis la romanon, kiun eldono KLEKS aperigas je sia *Nigra Serio*.



Temas la libro pri intervjuo al Nobelpremito pri Literaturo Pretekstat Taŝ. Li neniam permesis, ke ĵurnalisto intervjuu lin, sed finfine, kiam ankoraŭ mankas al li nur du monatoj antaŭ sia morto pro kancero, lia sekretario Gravelino elektas kelkajn ĵurnalistojn por intervui la majstron. Laŭ la libro oni prezentas al ni interesan psikon de geniulo kaj solvo de krimo malnova; sed ne estas detektiva romano. Fakte, ne estas *suspensa* (intencita prokrasto de solvo), kvankam intereso ne malaperas dum la tuta legado.

Mi ne ŝatis, tamen, la barbarismojn, kiujn la tradukistoj enkondukas en la skribadon, ekzemple, *hati* (malami), jeŝ (supozata *slanga* —tio estas, vulgara—

vorto neniam dirita), kaj kelkaj aliaj.

Tamen, la libro estas bona ekzerco pri legado.

La infanoj en la arboj

Ĉarma rakonto pri infanoj loĝantaj ĉe arbaro sudamerika, kiuj volas protekti sian ekosistemon kontraŭ grundspekulacio. Notinda altkvalita tradukado de Nora Caragea, esperantistino sufiĉe konata ĉe ni. La aŭtorino de la libro estas Gudrun Pausewang, la desegnaĵojn kreis Inge Steineke, kaj publikigis ĝin Inter-kulturo, Maribor, Slovenio. Ĝi kostas 9 eŭrojn ĉe nia libroservo aŭ ĉe la tradukistino: *Nora Caragea, Poŝtfako 100513, D 60005 Frankfurt am Main, Germanio*. Pri la aŭtorino endas aldoni, ke ŝi estas populara en Germanio por siaj infanlibroj, kaj ŝi gajnis multajn premiojn de kompetentaj ĵuristoj. La esperanta traduko akiris la premion *Infanlibro de la jaro* en la kadro de *Bel-artaj Konkursoj* de UEA.



La libro estas rekomenda

dinda ne nur por interesatoj pri nia literaturo, sed ankaŭ por esperantaj instruistoj, kiuj povas uzi ĝin kiel fonto pri fakvortoj pri *natur*o, *etnoj*,

kamaparantaj laboroj aŭ infanoj pri la mondo. La tekston oni aranĝis kvazaŭ poemo, kio certe plifaciligos la legadon fare de junaj legantoj -al kiuj la libro ĉefe celas.



*Neniuj promenoj
neniuj edziĝsonoriloj
bezonas konfirmi tiun amon
sufiĉas scii, sufiĉas senti
ke la vivo estas pli bela
nur pro tio
ke vi ekzistas.*

Tio estas unu el la 32 poemoj en la libro ***Memevoluo kaj dancantaj figuroj***, verkita de María Amanta Smilet. Ĝi estas ĝentila poemareto pri amo al si, al arto kaj al poezio, sed ĉefe al vivo. Post atenta legado, ĉi tiu libro reamikigas nin al vivo kaj amo. Mi rekomendas ĝin gustumi iom post iom. Ĝin oni povas trovi ĉe la libroservo de UEA kaj ĉe la aŭtorino, kontraŭ 3 eŭroj.

Raportoj el Japanio.

Yasuo Hori estas japano, kiun mi havis la ŝancon koni ĉe la malfermo de la 84a Kongreso de UEA ĉisomere. Post legi



sian libron ***Raportoj el Japanio***, mi konkludas, ke lia parolo estas malkomplika kaj ĝojplena. Post klarigi al siaj esperantistaj geamikoj pri sia lando, li trovis pli rapide publikigi libron tiurilatan ol respondi al sama demando per multaj leteroj. Post atenta legado, oni komprenas iomete pli bone pri mirinda kulturo, kiun Esperanto alproksimigas al ni. Tiu libro estas esperiga verko al ni, pro tio, ke ĝi estas farita de memlernanto pri Esperanto. Lia prozo estas tre klara kaj malteda serio da artikoloj sendependaj inter ili pri Japanio.

Eraroj kaj sinperdoj (*Irrungen, Wurrungen*), de Teodor Fontane, estas interesa libro, kiun mi legis ĵus reveninte hejmen el Kongreso de UEA. Bedaŭrinde oni ne ankoraŭ ĝin tradukis en

Esperanton, sed espreble oni faru tion baldaŭ. La libro kariĝis al mi pro tio, ke la rakonto okazas en Berlino, ĉe stratoj kaj najbarejo tra kiuj mi promenis dum la lasta kongreso de UEA: Kunfürtendam, Kunfürtenerstrasse, Unter den Linden, la Pordego de Brandenburgo, la rivero Spree..., ankaŭ Karlovy Vary estas menciita!



Zoologiaj ĝardenoj de Berlino, XIX-a jarcento

Dum la lasta jarcento, germanaj armeaj oficiroj ne povis edzinigi laboristinojn aŭ *malaltklasajn* virinojn, sed nur riĉajn heredontulinojn. Sekve, la *malheroo* de la libro, Barono Botho Rienäcker, komencas romantikan aferon kun kudristino Magdalene Nimptsch. Sed la ĉarman feinrakonton faktoj finigas:



onklo Kurt Anton kaj ankaŭ la patrino de Botho konvinkas lin, ke li devas edzinigi riĉan Käthe-n. La libro estas akra kritiko pri berlina socio en la XIX^a jarcento, kaj ankaŭ aperas kritikoj de la aŭtoro al kelkaj samtempuloj siaj, kiel refero al poliestro Ludwig von Hinckeldey atestas.

Resume, la libro estas ĉarma rakonto kies celo estas ĉefe prezenti la staton de aferoj en tiu Berlino de la lasta parto de

la XIX jarcento. La eldono de mi legita estis zorgata de Ana Pérez, kiu ankaŭ tradukis la tekston en la hispanan, kaj ĝi estas publikigita de *Cátedra* en sia kolekto *Letras uni-*

versales (literoj universalaj), kaj la prezo estas 950 pezetoj.

Esperanto malsanktigita

Ziko Markus Sikosek estas germano, kiu konvinkis min per sia zorge dokumentita libro *Esperanto sen mitoj*, ke ne ĉiam gravas aŭ utilas pravi.



Ni vidu: laŭ Ziko Markus, la esperantistoj kondukas dekomence kvazaŭ sekto, ili *propagandas* (fia vorto, laŭ li) por Esperanto kaj ofte mensogas, ĉefe pri la kvanto da esperantistoj en la mondo. Ankaŭ ili memtrompas pro tio, ke ili opinias, ke Esperanto estas la sola solvo al la lingva problemo (kiu ne ekzistas en la singularo, laŭ S-ro Sikosek), kaj ili fidas, ke iam estos *fina venko* de Esperanto. Ankaŭ ili uzas flagon kaj himnon tiel adore kiel naciistoj.

Fakte, mi mem konsentas pri preskaŭ ĉio, sed nur pri la *faktoj*, ne pri la *sinteno* esprimita en la libro. Mi volas diri, ke esperantistoj *erare* faras tion, sed ne *fuŝe* (vidu tiurilate interesan artikolon de Evaristo *Al mia kara instruisto* en *Kajeroj el la Sudo* n-ro 42-a).

Ankaŭ mi opinias, ke S-ro Ziko Marko Sikosek-o erare verkis tiun ĉi libron, sed estus troe aserti, ke li fuŝas iun ajn aferon per tio. Esperanto estas, laŭ mi, tiom daŭrebla, ke ĝi

postvivos certe malgraŭ la agado de tiuj esperantistoj, kies *fian agadon* Sikosek notigas, kaj ankaŭ ĝi postvivos tiun agadon de Sikosek mem. La subtitolo de la libro pensigas multe pri ĝi, kaj estas efika aĉetilo: *Mensogoj kaj memtrompoj*. Se la libro estus pli milda kaj malpli aroganta, ĝi efikus multe pli. Ni esperantistoj ne volas gajni — ĝenerale parolante — iun ajn personan profiton el Esperanto. Multoj sentas kvazaŭ religian miron al interna ideo, al la *iniciatoro* kaj al la lingvo mem. Mi opinias, ke tiu miro ne speciale utilas, sed ankaŭ tute ne malutilas al disvolvo de Esperanto. Sed tio verŝajne ĝenas al sektoro de esperantistoj, kiuj, dirante, ke oni ne parolu pri *fina venko*, konsideras ke tiuj infancaj sintenoj malhelpas ĝian alvenon. Ĉar se oni konsideras, ke ne necesas fina venko, kial ĝeni pri malbona informado?



Tamen la libro maljustas pri elstaraj esperantistoj estintaj kaj estantaj, kiuj, kvankam ili faris erarojn, estas tute imitindaj. Sikosek diras, ekzemple, ke:

- 1 *Esperanto ne estu prezentata kiel lingvo de Zamenhof*. *Vivanta lingvo apartenas al ĉiuj, kiuj uzas ĝin* (paĝo 217). Evidente, malutilas tiuj idiotoj, kiuj parolas pri la *Lingvo de Shakespeare*, kiam ili vere signifas la anglan...
- 2 *Zamenhof ne estis lingvisto*. [...] *Zamenhof estis lingvistika amatoro* (paĝo 223). Tio veras. Zamenhof diplomatiĝis pri medicino kaj okulkuracado, ne pri lingvistiko. Mi aldonos al la *listo de tiuj bruemaj nelingvistoj* la nomojn de **Miguel de Cervantes** kaj **William Shakespeare**, tute ne konitaj ĉe la universitatoj de siaj tempoj.

Lingvistoj ekde ilia tempo ĝis hodiaŭ malsukcesis uzi la anglan aŭ la hispanan tiel efike kaj bele kiel tiuj du ruzuloj. **Otto Jespersen** estis tre altkvalita lingvisto, kiu eĉ inventis artefaritan lingvon, **Novial**. Oni neniam parolis ĝin. Eble ĝi estis *tro lingvistika*...

Aliaj malakceptindaĵoj tuŝas plifunde Esperanton mem (bizare, Sikosek uzas la vorton *Esperanto*, escepte de en citaĵoj, kvazaŭ ĝi ne estus propra nomo, ...): *la 16-a regulo estas mito* (paĝo 158); oni ne insistu pri la *artefarita* kvalito de Esperanto (kio malbonas pri *faro* aŭ *arto*?); *Esperanto ne estas lingvo sen esceptoj* (vidu pri *lando* kaj *-io*, paĝo 147); *mankas nuancoj al Esperanto*; *homoj lernas lingvon se estas avantaĝo, eĉ se ĝi estas malfacila* (mi ne vidis tion, kiam mi vizitis Germanion: preskaŭ neniu povis elteni normalan konversacion kun mi en la angla, la imperia lingvo tiom utila por ĉiuj). Laŭ mi, la plej grava eraro de Ziko Marko Sikosek estas, ke li taksas Esperanton *lingvo kiel iu alia*, eĉ li konsideras ĝin *fremda*¹ lingvo, verŝajne pretervidante, ke tiu vorto signifas *alies*, *alilanda*, *senrilata al la koncerna persono*. Tiu erarkonsidero generis la libron, laŭ mia opinio.

Oni diras en Hispanio, ke *bona libro havas centon en sia sino*, kaj tiu ĉi enhavas milon. Tamen, tio ne provas ĝian bonecon, sed ĝian polemikindecon. Pensigas ĝi pri niaj fundaj konceptoj rilate al Esperanto, kaj tio estas bona. La libro ŝajnas katalogon pri novaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto kaj ties subtenantoj. Ĝia pridiskuto meritis pli da spaco ol ni povas dediĉi nun. Mi rekomendas legi ĝin kun almenaŭ tiom da kritika sinteno, kiom la aŭtoro montris al aktiva esperantismo.

¹Kutime tio sinonimas *duan*, sed ne ĉi kaze.

Eseo *Pri la arto paroli*

Ĉe la antaŭa numero oni legis pri la arto verki (*Malskribemuloj*, supozeble verkita de la redaktoro). Ekzistas, tamen, kaŝita arto paroli, pri kiu verŝajne tre malmultaj el ni scias, pro tio, kion oni aŭdas kutime ĉie ajn.

Ni difinu (eksterpive) tion, kion oni komprenas pri bazaj vortoj tiurilate: *konversacio, debato, disputo, interinsultado, rimarko, klarigo, monologo, parolado, demando kaj respondo...* Mi kredas, ke tiuj vortoj enhavas la tutan aferon pri kio oni kutime komprenas kiel *parolo kaj paroli*.

Paroli estas, laŭ mi, la homa ago komuniki ion per logike ligitaj vortoj, sendepende al ĉu estas kunparolanto aŭ ne, kaj ĝi enhavas la sekvantajn konceptojn: *koversacio* postulas, ke ekzistas almenaŭ du kunparolantoj. Oni povas konversacii nur por plezuro, kaj do kion oni diras aŭ kiu pravas tute ne gravas. Tio okazas ĉefe inter geamantoj aŭ unuafojaj interkonatiĝantoj. Ankaŭ inter amikoj bonaj, kiujn ni nun renkontas post longa nekunesto: pli ol novaĵoj (kiujn eble ili ambaŭ jam konas perkoresponde) gravas aŭskulti amikan voĉon, senton, kunridon kaj nevirtumoblajn voĉajn indikojn. Kutimas, ke oni interrompas unu la alian kaj ne estas ĝeno en la komunikado: ĉio gravas al vera amiko pri sia amiko. Sed ankaŭ nekonatuloj povas konversacii: parolante pri sengravaĵoj ĉe tramo aŭ metroo (bedaŭrinde tiu kutimo jam perdiĝis) la vojaĝo mallongiĝas multe, kaj iom post

iom konversacio povas eniri tiun fazon prikomentita pri interamikiĝo.

Dialogo estas plua fazo karakterizita de ideo pli ol formo; tiu estas, ke ambaŭ kunparolantoj devas aldoni proprajn ideojn al sama temo. Tamen, la temo ŝanĝiĝas laŭ nevertigita akordo. En dialogo povas aperi monologoj, kiel ni vidis en tiu mirindaĵo, *Dialogoj* de Platono. Tamen, oni kutime reiras al pura dialogo -tio estas, interŝanĝo de ideoj- kaj eĉ al konversacio kiel fino de parolo..., kvankam eksterparolaj okazaĵoj povas interrompi ĝin senĝene (eliro, nova konversacio kun aliu, kaj tiel plu).

Tamen, dialogo povas subite malkaŝi koncepton pri kiu malkonsentas la kunparolanto. Tiel komencas la *debato*, tio estas, interparolo celante konvinki la alian pri io. Nun gravas ne interrompi kaj argumenti bone. Oni devas aŭskulti la tutan argumenton de la alia kunparolanto por bone rifuti ĝin. Estas multaj rimedoj por argumenti, kaj la arton bone debati kaj argumenti oni konas kiel *retorikon*. Aliartikole ni pridiskutos ilin, sed nun mi volas averti kontraŭ -laŭ mia kono- preskaŭ universala kaptilo en debato, kiu povas porti ambaŭ parolantojn en disputon kaj eĉ interbaton: atako *ad hominem* (al homo). Tio estis tre uzata de grandaj argumentistoj en antikvaj tempoj -kiel Johano Krisostomo kaj aliaj *patroj* de la Eklezio Katolika-, sed eĉ tiel ĝi estas fia, kruela, kaj ĉefe eksterdebata: ataki ne la argumenton, sed la argumentiston ne provas, ke oni pravas¹. Atakoj *al homo*

¹*Kiam Sirilo de Aleĥandrio kaj sia popolaĉo murdis Hipatjan, li ne mortigis sciencen aŭ pruvis, ke ŝi ne pravis, sed sole, ke li kaj la kristanoj estis barbaroj.*

estas tre malmultekostaj kaj malaltaj rimedoj, kaj ili ne postulas inteligenton aŭ lertecon, sed nur fivolemon. Renkontinte tion, la sola afero por fari estas ripeti la argumenton, kaj signali, ke oni ne debatas personojn, sed ideojn.

Disputo estas malbona flanko de *argumentado* aŭ debato, kaj ties celo ne estas trovi veron, sed *pravi sian* argumenton. La celo estas pravi, ke la alia disputanto ne pravas. Estas facila eliro al tiu: *pravigdir* la alian. Aŭ bati ŝlin¹. Mi preferas la unuan, ĉar ĝi estas la plej inteligenta ago de homo pacema. Se oni ne faras tion, kutime komencas interinsultado, kiu malaltigas ambaŭ interparolantojn...

Meze de debato oni povas permespeti por fari *rimarkon*, pli longan intervenon celante klarigi aŭ difini etoson pri io dirita aŭ dirota. Se tiu rimarko estas tro longa, oni faras *monologon*, kio kutime ne estas ĝentila al kunparolanto. Tamen, estas eksterparolaj indikoj, kiuj povas informi, ke la monologo estas ne sole permesata, sed eĉ dezirata de kunparolanto, kaj sekve oni povas trankvile fini ĝin. Tamen, mi ne konsilas multe uzi monologon, ĉar la tempo por interparolado estas kutime malmulta, kaj la celo de la afero estas interkompreno, ne instruado. Ambaŭ parolantoj devas interveni sufiĉe ofte, por ke la interparolado estu viva kaj renkompeniga.

Parolado estas tio, kion instruisto faras en sia klasĉambro, kaj ankaŭ prelegisto antaŭ aro de homoj, kiuj venis al aparta loko por aŭskulti pri koncerna temo. Male al *debato* (kaj *konversacio*, ĝene-

rale), kiu postulas, ke la kultura nivelo estu pli-malpli sama ĉe ambaŭ intervenantoj, kutime la preleganto aŭ prelegisto ja regas la temon dirantan je pli alta nivelo ol siaj aŭskultantoj. La parolado devas esti klara kaj dirata de sufiĉe laŭta voĉo, kun bona prononco kaj distinkta melodio, neniam monotona, ĉar tio tedas. Ne estas pli absurda afero ol spritaĵo aŭ ŝerco dirita meze de parolado per monotona voĉo: ĝi povas eĉ nerimarkigi. Oni povas deflankigi la temon, sed nur momente kaj por klarigaj celoj. Alimaniere la aŭskultantaro perdiĝas kaj oscedoj aperas.

Post parolado -se sukcesa- aperas *demandoj*. Tiuj demandoj devas celi klarigojn pri kio oni ĵus aŭskultis, sed pro respekto al la cetera aŭskultantaro, demando ne povas esti kaŝita prelegeto. Se oni ne konsentas pri io, kion oni aŭdas en la prelego, sufiĉas ĵus averti ĝin kaj aldoni etan argumenton pri ĝi, sed ne komenci debaton. Kiam tion oni ne plenumas, oni komencas debaton kun la preleganto, kaj tio povas konduki al simpla *konversacio*, kiu ne ĝentilas al la cetera aŭskultantaro. Se okazas, ke ili jam foriris, la afero ne gravas, tamen.

Isabel Acevedo



Kanto malama komencas, kiam parolo mankas.

¹ŝlin: ŝin aŭ lin.

Himno de Esperanto

Dum la lasta Universala Kongreso de Esperanto (84-a, ĉe Berlino) oni demandis al mi, kial mi ne staras kaj kantas la himnon ĉe la fermo de nia kunsido, sed mi sidas, silentas kaj rigardadas iomete impertinente. Pri tio, ke ĉiam esperantisto demandas al mi, mi klarigas ĉi tie por ĝenerala ekscio.

Unue, mi devas deklari, ke mi respektas la vortojn ĉe tiu poemo de Zamenhof, kaj ambaŭ la muzikon de E. de Ménéil, kiun oni povas trovi ĉe interretaj paĝoj <http://www.distrito.com/esperanto/espero.htm> kun hispana traduko kaj <http://www.distrito.com/esperanto/hope.htm> kun tiu angla.

Tamen, mi vidas, ke himnoj estas signoj de nacioj. Ĉe sportaj kunvenoj oni kantas siajn himnojn, kutime kun la mano sur la koro, ĵus antaŭ ol oni batalas sporte. Ĉe olimpiadoj ankaŭ oni ludas la himnojn de la venkintoj je ĉiu provo. Ĉe nesporta vivo, nacioj trudas siajn vivmanierojn unu al la aliaj ĉu kaŝe ĉu malkaŝe. Ne alimaniere oni povas klarigi al si tiun gravecon donitan al tiu nova dio, Sankta Demokratio, kiu —same kiel iu ajn aliaj dio— tute ne ekzistas en la reala mondo, ĉefe ĉe tiuj sin-nomitaj *demokrataj landoj*. Sed Trudo ja estas vera demono, kiu ja ekzistas. Ĝia ĉefa ilo estas nacio, kiu ankaŭ estas ĝia kerno. Naciistoj konfuzas

kulturon kaj nacion, kaj tial ili parolas pri siaj etaj nacioj, kiu (pli ofte ol ne) tute ne ekzistas, signifante siajn kulturojn, kiu ja ekzistas. Ĉar kulturo estas evidente tio, kion oni kulturas (tio estas, kion oni kreas, disvolvas, flegas kaj plibonigas). Pro tio, kulturo estas vere *persona*, kaj el tio, ke oni influas plej facile —kaj estas influita de— siaj najbaroj kaj kuncivitanoj, oni ne devas eltiri la konkludon, ke *kulturo* estas io, kiun oni devige heredas pasive. Oni ja devas elekti aktive pri kiuj kulturajoj utilas al onia persona individueco. Kompreneble, estas aro da kulturajoj kiuj niaj praavoj kreis, kaj kiujn ni sufiĉe nekonscie akceptas. Sed pruvo, ke oni ne ĉion akceptas estas, ke oni ŝanĝas morojn kaj kutimojn, sintenojn kaj celojn. Naciistoj, tamen, apartigas kulturojn plej malproksimen kiel eble,



Estas nur unu mondo. Ĉu ni dividas, aŭ kunhavas ĝin?

troas faktojn, kaj —se necese— mensoĝas. Ili ankaŭ estas problemigaj kaj bataligaj, kaj oni devas vere ami pacon por ne fali en siajn kaptilojn —kutime denunciataj de malĝentilaj vortoj kaj sinteno—. Ili postulas respekton sen respekti la postulaton... Sed ni ne plu parolu pri naciistoj —ĉu grandaj, ĉu

malgrandaj, ili estas same malpravuloj— nun.

La hispana himno, la *Reĝa Marŝo*, estas la sola nacia himno laŭ la tuta mondo kiu estas nekantebla. Ĝi vere ne estas hispana kanto, sed nederlanda kanto donacita al Reĝo Karlo III-a de Hispanio, fare de nederlanda reĝo antaŭ preskaŭ tri jarcentoj. Antaŭ 60 jaroj, Diktatoro Fransisko Franko Baamonde ordonis, ke oni kreu vortojn por la himno, tial ke siaj reĝimanoj povu kanti *Arriba España* (supren Hispanion) same kiel hitleranoj tiam kantis *Deutschland über Alles* (Germanio super ĉiuj). Sed la reĝimo franka mortis, kaj tiujn sensencajn vortojn oni forbalais kune kun ĝi. Pro tio, ĉe sportaj kaj aliaj oficialaj kunvenoj oni ne kantas tiun himnon, sed oni staras kaj aŭskultas, kaj poste oni aplaŭdas.

Ĉe niaj renkontiĝoj esperantistoj kutime staras kaj kantas *La Esperon* nacistile (krom la mano sur la koro, kiun neniu metas, laŭ mia kono). Ankaŭ estas tiuj, kiuj staras, sed ne kantas (hispanstile, krom neaplaŭdo); kaj ili faras tion pro nescio de la vortoj aŭ pro objekto al *nacia flanko* de Esperanto.

Mi forte kredas, ke ja malmankas sufiĉe da nacioj en la mondo. Nacio estas la ĉefa kaŭzo de milito, kaj pro tio ĝi estas abomeninda, laŭ mi. Ni ne kreu novan nacion, *Esperantion*, kaj ni ĉesu senti kaj agi kiel *persekutata* popolo en diasporo. Esperantistoj *ne estas popolo* kaj *Esperantio* tute ne ekzistas. Nur ekzistas sendependaj homoj kunligitaj de emo al interkomuniko kaj interkompreno (bazaj aspektoj de amo, evidente), kiuj

pli ol eble kunhavas nenion pli ol komunan lingvon Esperanton.

Mi ŝatas muzikon ege, sed mi abomenas politikajn eltirojn de himnoj. Pro tio, mi nur povas respekti iel unu himnon sur la tero. Himno kiu reprezentas neniun nacion, sed milionojn da personoj. Ĝi estas *Himno al Amo*, iam kantita de la neforgesebla kantistino Edith Piaf, kies vortoj estas tiuj:

*La ĉielo falu ja sur nin,
kaj la tero ja fandiĝu ĝi,
se vi amas min tutkore,
Ĝi okazu diras mi.*

*Dum ke brakoj viaj tenas min,
Dum vi estas tia belulin',
la plej gravaj monproblemoj,
Ja ne gravas ili, kara, min.*

*La amikojn mi forlasus, stelon for mi
ĝoje ĉasus
Kiam vi demandas min,
Iros mi al mondolim', ne sentatus ĉe mi
tim',*

Ja se vi demandas min.

*Havos ni eternon, karulin'
Mi vin amos kaj vi amos min
Ĉe ĉiel ne estos zorgoj
Dio ligos nin favore.*

Mi nur aldonu, ke aŭskultante tiun ĉi himnon, oni ne staras: oni kuŝas. ☺

Armando



Nova konceptoj kaj antaŭjuĝoj – Teama sperto ĉe priinteligentaj handikapuloj

Prelego okaze de la 9a Kongreso de HALE en Lorko (Murcia)

Enkonduko. - Mi estas DUE (hispana mallongigo de Universitate Diplomita Flegisto) kiu de antaŭ kelko da jaroj laboras ĉe rezidenca centro de ISSORM (Instituto de Mursjo por Sociaj Servoj) profite al granda kolektivo de profundaj priinteligentaj handikapuloj (80: de 18-a ĝis 60-jaraĝaj).

Nature, la spertoj de mi pridirotaĵoj al vi ne nur estas propraj, sed ankaŭ estas de aliaj flegistoj laborantaj kun mi kaj eĉ de familianoj de la handikapuloj, la psikologo de la centro, la fizioterapiisto, la kuracisto, la edukistoj, ktp.

La homoj prizorgataj de nia eduko-sanfaka teamo, krom siajn inteligentajn nesufiĉojn kutime suferas aliajn diversajn nesufiĉojn ĉu fizikajn ĉu sensajn kunasociataj.

La celo, kiun mi volas atingi per tiu ĉi prelego iom ne kutima en Esperantaranĝo, ne estas atingi laŭdojn por nia silenta, grava kaj miskomprenata laborado, sed ekskluzive konsciigi al vi pri la ekzisto de tiu ĉi speciala problemaro kaj vin kuraĝigi al agado solidareca ĉu

politika, ĉu per informita komprenema apogo al la trafitaj familioj kaj pacientoj.

La graveco de la multprofesiula teamo kaj de la atento al la familianoj de la pacientoj kaj ties ĉirkaŭaĵon.

Korekta atento al tiuj ĉi pacientoj baziĝas sur la ellaboro de kompleta individua prifarta historio (IPH). Profunda priinteligenta handikapulo nek povas, ofte, alporti nin siajn detalojn biografi-ajn, nek scipovas rakonti al ni detale sian simptomaron, aŭ, eĉ ĝi ne kapablas indiki al ni kie troviĝas sia doloro. Ofte



ankaŭ ili ne nur kunlaboras pasive por la esploroj korpaj, sed ili rezistas tiujn ĉi per ĉiuj siaj fortoj aŭ agreseme. Do, oni bezonas la helpon de ties parencoj, de antaŭaj dokumentaj raportoj pri ili, kaj krome, de teamo adekvate formita kiu ebligos nin akcepteblan

esploron. Aldone tion ĉi, la informoj alportataj de psikologoj, sociaj laboristoj, fizioterapiistoj, flegistoj kaj edukistoj je siaj kontaktoj kun la trafitaj ĉiutage, estas fundamentaj por fari indan laboron. Tiujn ĉi informojn, se necese, oni povas sendi al aliaj specialistoj (psikiatroj, neŭrologoj, rekapabligistoj, ktp), kiam ili devas esplori niajn pacientojn. Estas necese, ke la multprofesiula teamo agu, ne kiel aro de individuoj, kiu batalas apartajn militojn paralelajn, sed

harmonie kaj kunlabore. La teamo ankaŭ kapablu distingi la antaŭordaĵojn kaj alpreni atenton realisman, kompletan kaj respondecan. Profesiulo sola ĉiam atingas partajn informaĵojn, kio malfacile helpas pri la kompleta sano de la pacientoj. Ankaŭ neniu povos apliki trafan terapion se ĝi ne kalkulas kun la celoj fiksitaj de la ceteraj profesiuloj, kiuj zorgas pri la samaj personoj.

Ne decas atenti al PHo (mallongigo de priinteligenta handikapulo) kvazaŭ izola estaĵo. Estas fundamente koni kaj kalkuli kun siaj parencoj kaj kuratoroj. Sanfakulo kiu ne kalkulas kun la medio en kiu vivas la PHo, per speciala delikateco konante la specialan strukturon de sia familio kaj la evoluon, kiujn ili travivas,

neniam sukcesos pritaksi objektivite sian propran taskon, kaj krome, ĝi malzorgos la bonfarton de sia paciento. Ankaŭ estas grave ĉi-cele kalkuli kun la kunlaboro de la multprofesiula teamo. Ofte la gepatroj aŭ kuratoroj sentas sin kulpaj, nesekurecaj kaj senpovaj antaŭ tiom da demandoj sen respondoj kaj sentiĝas preterpasitaj de la realo. Tio ĉi povas esti konsultojn streĉitajn, plenaj de postuloj kaj nekontentigaj por ambaŭ la gepatroj aŭ kuratoroj kaj la profesiuloj; situacioj en kiuj la ĉiam nepra dialogo fariĝas ege malfacila. La anoj de la teamo devas

apogi unu la aliajn kaj interŝanĝi spertojn por prezenti konfidinde kaj unuece la terapiojn. Ni devas esti konsciaj pri la fakto, ke kiu ajn estos la prizorgantoj de la PHoj, se ili ne bone komprenas nian vidpunkton, la paciento ne sekvos la terapion, ne gravante kiom mirinda ĝi estas. Dorloti la komunikon, krei konfidan etoson, kuraĝigi la respondecon kaj malaltigi la maltrankvilecon de la zorgantoj de la PHoj estas startopunktoj por ajna konsulto.

La malhelpoj por la profesiuloj:

1. La unuaj malhelpoj kiujn oni povas trovi estas tiuj psikologiaj, tio estas:

a) Por kelkaj homoj la ĉefa rifuzo al

PHoj estas estetika, tio estas, ke ili montras specialan malplaĉon alproksimiĝi al personoj (estaĵoj), kiuj tiom malproksime estas de la kulturaj modaj regularoj. Estas fundamente rigardi al la *mensaj handikapuloj* (aŭ priinteligentaj handikapuloj) tiel, kiel ili ja estas; sen antaŭjuĝoj; kiel homojn kies specifaj fizikaj trajtoj ne nepre ŝajnu al ni ma-

lagrabla; ĉar kiel eblas kompreni al iu ajn kiu naŭziĝas nin? Kiel fari tutdetalan esploron al ili, se ni estas ankoraŭ baraktante kontraŭ niaj propraj sentoj rifuzaj? Ne estas malofte trovi priinteligentajn



handikapulojn malĝuantajn alies korinklinojn ĉar multoj el la personoj de sia ĉirkaŭaĵo; ĉu familianoj ĉu nur flegaj profesiuloj; neniam alproksimiĝis por karesi ilin aŭ, se tion ili faris, estis nur laŭ malgracia, senama, embarasa maniero. Estas ankaŭ ofta la *speciala maltrankvileco* kiu ekestas ĉirkaŭ la menciitaj personoj, antaŭ ties alveno en la atendejojn de la hospitaloj, kun rigardoj plenaj de malplaĉo el personoj tie atendantaj kiuj tiel esprimas sian naŭzon antaŭ la PHo.

- b) La timo esti atakataj estas alia el la plej unuagradaj kaj estigas specialan urĝon pri la esploro al tiuj ĉi pacientoj. Ankaŭ estas tre timigaj la krioj kaj aliaj sonoj eligitaj de la handikapuloj, kiuj uzas ilin ofte nur kiel anstataŭilo de nia parola kodigita komunikado. *Ĝi krias troe, ĉu ĝi ne estas batonta al ni?* Jen frazo ofte dirita kaj pensita de multaj ceteraj uloj ne konantaj la realon de tiuj ĉi handikapuloj.
- c) La timo al si mem, kaj respondi al la *fundamentaj demandoj* ekstartigitaj antaŭ la ektrono kun tiaj ĉi pacientoj: *Ĉu Dio ekzistas, pri kio mi rajtas plendi..?* Jen alia el la unuagradaj timoj, kaj unu el la plej seriozaj por esti superataj. Aperinte tiuj ĉi timoj oni kutimas reagi laŭ du eraraj manieroj: ĉu malproksimiĝi sin de tiaj pacientoj, ĉu montri ŝajne protektan kaj ja falsan patreskan stilon. Eble la korekta sinteno konsistas el trafa kaj sincera respondo al la demandoj priviva

(kion ni faru por tiaj homoj?) kaj klopodi apliki novajn manierojn komuniki kaj ekkoni ilin.

- d) La timo ne scipovi koherere respondi, timo al la senagebleco, al la deprimado, antaŭ la danĝero esti devigata al drastaj ŝanĝoj persona kaj kutima, al la propra ne sinelteno, estas kiel subtila invitilo por la transfakiĝo de kelkaj profesiuloj pri rekta kaj tuttempa zorgado.
- e) Postlasu nin la timoj nun, ĉar mi nur intencis prirakonti la ĉefajn malhelpojn, kaj ne plendetales pritrakti iln.

2. La sekvantaj malhelpoj estas tiuj socie devenigitaj kaj plejmulte bazitaj sur bonintencaj sed eraraj ideoj:

- a) Konsideri al la priinteligentaj handikapuloj kvazaŭ etaj malfortunaj infanoj (ne ĉiuj estas infanoj) kaj alpreni intence ignoran prirakontadon sintenon kiu kuraĝas eĉ la esprimon *bedaŭrinduloj, estus plej bone por ili morti*.
- b) Roli kvazaŭ dioj kaj kredi, ke nia valorgradaro estas la nura taŭga, kaj sekve, konsiderante ke, ĉar ili neniam atingos tiujn celojn de ni plej pritaksitaj, aŭ ĉar ili neniam sukcesos travivi spertojn, laŭ ni esencaj, por la homa feliĉo, ni elektas la alternativon esti ĉi tiel sedativitaj preskaŭ tuttempe *por ke ili ne suferu*.
- c) Ekzistas ankaŭ la erara emo kompensi ties handikapulon tolerante al ili miskondutojn, (ekzemple, lanĉi plenajn telerojn al grundo), aŭ

plezurojn, kiuj ni mem scias, ke ne estas bonaj aŭ socie akcepteblaj (*lasu al tiu bedaŭrindulo mangi tro multe, ĉar ĝi estos sia nura plezuro en la vivo*).

Ankaŭ ni, la laboristoj kiuj elektis meriti ĉiutage niajn salajrojn, suferas klaran malestimon kies ekzemploj estas la jenaj faktoj:

- Tre ofte oni konsideras nin (ĉu flegistoj, ĉu kuracistoj) kiel dua-gradajn profesiulojn, kvazaŭ se ni estus elektintaj labori ĉe tiaj handikapuloj ĉar ni ne povis aŭ me sciis labori aliloke. Ofte oni malfidas pri niaj profesiaj kapabloj kaj krome, niaj salajroj, eble rezulte de tio, kutimas esti konsiderinde pli malaltaj ol tiuj de samprofesiaj laborantaj ĉe aliaj kolektivoj.
- Ekzistas tro altruisma pritakso rilate nian laboron, kio kreas distancon inter ni kaj la ceteraj sanofakuloj: *vi estas gajnanta pecon de ĉielo, kial vi ne fariĝis pastro?, mi estas certa, ke via laboro ne estas pagebla per mono*, jen frazoj kutimaj kiuj bonintence apartigas nin de la ceteraj personoj kaj samtempe subtaksas nian solan vivantan realon kiel sciencajn sanfakulojn.
- Estas abundaj la eraraj ideoj, ekde tiuj, kiuj celas izoligi la handikapulojn en kvazaŭ orajn karcerojn ĝis tiuj, kiuj proklamas ke vivante en demokratio nur la plejmultoj gravas, tial en epokoj krizaj nepre la handikapuloj estu la unuaj perdi siajn *privilegiojn*. Sed eble la plej kontraŭhoma kaj disvastigita ideo

estas tiu, kiu konsideras la priinteligentajn handikapulojn, kiel malsamajn vivestajojn, senkonscie senigante ilin je sia rajto vivi kiel dignaj personoj.

3. Rilate la specife profesiajn malhelpojn oni atentu pri la sekvantaj:

- a) Unue, la profesiuloj devas alproprigi la bonfartajn konceptojn, ekde tiu utopio de OMS (E-e: Organizo Monda por la Sano), kiu konceptas la sanon kiel *kompletan staton de bonfartoj fizika, mensa, kaj socia, kaj ne nur kiel mankon de malsanoj*. Ĝis tiu polemika esprimita kadre de la Kongreso 10-a de Kuracistoj kaj Biologiistoj Katalunlingvaj (en Perpignan. 1976^a), kiu diris, ke *la sano estas tiu maniero vivi aŭtonome (tio estas, kun la libereco elekti per kritikaj kapabloj, kaj esti informata) solidarece kaj ĝoje kiu ekzistas kiam oni alproprigas sian memkonstruadon*. Estas klare, ke la priinteligentaj handikapuloj ne povas elekti kaj tiel stariĝas la granda etika dubo: kiu havas la kapablon elekti anstataŭ ili? Laŭleĝe estas ties kuratoroj kiuj devas fari ĝin kvankam la sperto ĉiutaga pruvas, ke multaj el ili estas tro maljunaj aŭ malproksimaj parencoj kiuj ne konas pro iu ajn kaŭzo tiun ĉi specialan mondon (en nia centro de Churra oni kreis antaŭ kelkaj jaroj lernejon por Gepatroj kaj Kuratoroj de Priinteligentaj Handikapuloj, kiu celas konsciigi ilin pri siaj realoj kaj respondecoj kaj kle tiel ili estu kapablaj oferti individuajn adekvatajn respondojn al la necesoj

ĉiuf flankaj de la handikapuloj). La juĝistoj, pro sia troabundo de taskoj, tro malrapide decidas rilate la necesojn de tiaj malsanuloj. Do, se la kuratoroj ofte ne scias kaj la juĝistoj ne havas sufiĉan tempon, restas al ni sanfakuloj la rolo de etaj dioj, kiuj, ofte nesufiĉe formitaj, devas decidi timege kaj bonintence pri la vivokvalito de niaj pacientoj.

- b) Krom la antaŭo ankaŭ ektimigas nin la malfacilaĵoj por fari korektajn esplorojn. Ekzistas seriozaj teĥnikaj problemoj, krom multaj malhelpoj, kaj miskomprenoj por atingi kelkajn komplementajn diagnozajn testojn (laŭ kelkaj specialistoj medicinaj oni rezervu la plej kostajn testojn por la normaluloj). En la hospitaloj mankas rimedoj, horoj, kaj specialistoj pretaj kaj kapablaj digne priatenti tiajn pacientojn (ne maldigne kvazaŭ duonbestoj).

Danĝeroj por la estonteco:

Malgraŭ ĉio antaŭe dirita, estas vere ke oni multe atingis rilate justecon por la priinteligentaj handikapuloj en la lastaj jardekoj, tamen, la troa memkontento estas danĝero mem.

La tendenco al tuta izoligo de la handikapuloj en Specialigitaj Centroj, kvankam eksmoda, ankoraŭ ne malaperis, kaj ankoraŭ oni aŭdas komentojn de personoj malsolidarecaj, kiuj plende diras, ke la profundaj handikapuloj difektas la socian pejzaĝon.

Alia danĝero estas la enuo antaŭ tiom da malfacilaĵoj kaj antaŭ la ofta sento de senpoveco estas alia danĝero. Ekzistas multaj aliaj problemoj, kiuj pli kaptas la

intereson de la ekonomiaj premogrupoj kaj kiuj okupas la tutan tempon de la scientistoj kaj esploristoj. La malfacilaĵoj agu kiel defioj por senĉesa penado en tiu ĉi branĉo kaj la socio kaj la familioj konsciiĝu pri siaj etikaj devoj ĉiam profiti al la plej malfavoritoj.

Ankaŭ oni povas iri al la alia pinto kaj pritrakti la handikapulojn preskaŭ kiel objektojn por brilaj studoj celantaj nur la plenumon de niaj meritfolioj, sed senprofitaj por la vivokvalito de tiaj pacientoj.

Kion faru ni?

Iri antaŭen ĉiam kaj konstante. Tiucele estas nepraj la sintenoj aŭskultadi, rigardadi atente, kaj la humileco. Ĉiu ajn profesiulo kiu deziras labori por la priinteligentaj handikapuloj devas preni la devon rompi la mitojn regantajn socie kaj kiel eble plej efike malaperigi la erarajn ideojn pri la vivo kaj la realo de tiaj personoj.

Konklude:

Al ĉiuj aŭskultantoj, ĉu familianoj de priinteligentaj handikapuloj, ĉu kuratoroj, ĉu sanfakuloj, ĉu homoj tute fremdaj al tiu ĉi problemaro, **mi petas**, ke vi informiĝu kaj informu pri ĉi aferoj same kiel multoj informiĝis kaj informas pri la aferoj de surdamutuloj, blinduloj, diskriminaciitaj etnoj kaj monoritataj lingvoj, ĉar NENIU SOCIA PROBLEMO ESTAS SOLVEBLA SEN SUFIĈA KONS-



José Pina Tuells

La komenco de la milito

Ĉe nia antaŭa numero ni prezentis raporton pri la milito de Jugoslavio. Nun ni prezentas la unuan parton de tiu raporto, kiun ni ne havis tiam pro teĥnikaj kialoj.



Bedaŭrinde okazis! Antaŭ 4 horoj oni atakis Jugoslavion. Ĵus estis proklamita la *milita stato* ĉi tie. La anoncita danĝero de aer-atako daŭras. La unua 'ondo' de la atakoj pasis. Niŝ ĉi foje ne estas atakita. En aliaj urboj estas farita ia damaĝo, ĝis nun sen ajna mortigo.

En sabato ni havos la estrar-kunsidon de SerbeJO pri BaJK. Tre "interesa" situacio por ĵus elektita nova estraro de SerbeJO. La 20an de marto okazis la jarkunveno de SerbeJO. Oni elektis novan estraron kiu tuj komencis tre vigle interkonsentadi pri tuja komenco de iu pli aktiva agado...sed... La politikistoj estis pli rapidaj ĉi-foje. Aparte la estraranoj de NATO-alianco...

Ni informos vin pri la decidoj...

Niŝ, la 28an de marto, 08:30 h

Ŝajnas ke la NATO-administracio rapidas. Aŭ ĉi-matena atako je Jugoslavio estas pro la ĉi-noktaj plej novaj perdoj. Ĉiu okaze, post kvar-tagaj ĉefe noktaj atakoj, jen nun unu matena atako. Ŝajnas ke denove Beogrado kaj Priština estas atakitaj. Ĉi tie nenian bruon oni

ankoraŭ aŭdas (ja pasis pli ol 15 minutojn) kaj dum lastajn du noktoj ĉefaj atak-celoj estis ĝuste Beogrado kaj urboj je Kosovo (Priština, Djakovica kaj Prizren). Je kosovaj urboj oni komencis ataki ankaŭ civilajn celojn!

Ĉi-matena atako tre rememorigas pri la 6a de aprilo 1941. Je tiu dimanĉo, je la 6a horo matene, oni ekis bombadon de Beogrado. Ĉi estis 'respondo' de Hitler al la tiama serbia "ne", 27an de marto 1941, al la proponita pakto/okupo. Hieraŭ ankaŭ estis la 27an de marto. Ĉu la historio ripetiga?

Ĉiuj, kiuj estis en la kaŝejoj, verŝajne restos tie. Nome fino de la, lastnokte anoncita, aer-ataka danĝero estis anoncita nur ĉi matene je la 5a horo kaj je la 08:00 estis anoncita nova aer-ataka danĝero. Ĉi lasta ankoraŭ daŭras.

Ĵus oni informis ke ankaŭ urbo Ĉaĉak estas atakita ĉi matene...

Se vi deziras aŭ bezonas pliajn faktojn pri la ĉi tieaj okazaĵoj vizitu <http://www.serbia-info.com>. Tie vi trovos la anglalingvajn tekstojn. Ĉe <http://www.srbija-info.yu> troviĝas la serblingvaj tekstoj. Se vi deziras ekscii mian propran opinion pri ajna afero skribu al mi (zciric@EUnet.yu).

Bedaŭrinde ŝajnas ke nuntempe ĉe la ret-servilo "Eunet.yu" eblas nur forsendi la mesaĝojn. La komputilo kiu prizorgas la ricevadon de la mesaĝoj ne funkcias. Nome, de la 20a de marto mi ricevis nenian novan mesaĝon-respondon. Se vi sendis ian intertempe, mi tute ne scias kie ili nun troviĝas. Eble ĉe tiu ne funkciata komputilo...

Niŝ, la 29an de marto, 22:30 h

NATO-atako/bombado daŭras. Ankaŭ hodiaŭ la aktivajoj okazadis dum la tago. Post duonhora paŭzo komencis nokta 'parto' kiu ĵus daŭras. La sirenoj anonciĝis eblecon de aer-atako.

En Niŝ ne bruas. Tamen parto de la loĝantoj translokiĝis en la kaŝejoj por ĉiu okazo kaj la alia parto restis je siaj loĝejoj. Mi restas en la hejmo. Nur la fenestron mi malfermas (por aŭdi eventualan 'bruon'), la lampon mi kovras (por ke ĝia lumo ne estu videbla de ekstere), la radio estas enŝaltita (por aŭdi novaĵojn kaj sekvi la okazaĵojn) kaj la resto dependas de la sorto.

Hieraŭ krom la taga bombado komencis kaj bombado de la fabrikoj. Pro ĉi la laboristoj en kelkaj fabrikoj decidis defendi siajn fabrikojn per senĉesa restado en la fabrik-ejoj. Ili ne deziras vivi sen siaj fabrikoj... En Beogrado oni organizis tagmezan koncerton sub la nomo "Pesma nas je odrzala" (~ "La kanto ekzistigis nin") spite la anoncitan danĝeron de eblaj aer-atakoj. Similaj okazaĵoj, ĝuste dum daŭras ebleco de aer-atako, okazis ankaŭ je kelkaj aliaj urboj.

La veran celon kiun havis NATO-estroj por tamen ataki Jugoslavion mi ne scias. Sed - Se ili simple deziris 'faligi' la prezidanton Slobodan Miloŝević -la atako estis eraro. La popolo estas nun multe pli unuiĝita kaj pli solidareca. Ja la hejmlando estas atakita kaj ĉiuj ja estas pretaj defendi ĝin, la politiko tute ne gravas (por la ordinaraj homoj) je ĉi tia situacio. - Se ili deziris helpi al la albana loĝantaro vivanta je Kosovo - la atako estas eraro. La rakedoj kaj bomboj ne

faras diferencon. Ili detruas ĉion kaj mortigas ĉiujn-tute egale. Dum la hieraŭa bombado oni trafis ankaŭ la urboparton kie la plejmulto estas ĝuste albanoj. - Se ili deziris helpi al la "demokratiaj" albanaj fortoj kiuj deziras perforte okupi teritorion de Kosovo kaj separi ĝin de Serbio. Ja, la atako povus helpi sed nur se la surteraj fortoj venku la ŝtatajn fortojn kaj la nealbanan loĝantaron (ne nur serba) vivanta je Kosovo. Ĉi tiel oni nur faras bruon kaj detruas... - Se ili deziras NATO-bazon sur teritorio de Kosovo, ankaŭ por ĉi oni bezonas surteraj fortoj... Ĉu vere NATO havas rajton starigi siajn bazojn ie ajn en la mondo eĉ perforte sur teritorio de la ŝtatoj kiuj ĉi-tion ne deziras? Se iu ŝtato deziras NATO-fortojn en sia "korto", ja tio estas 'problemo' de tiuj ŝtatoj.

Oni ĵus informis ke NATO-aviadiloj estas rimarkitaj super Kruŝevac, la urbo troviĝanta je ĉ. 80-100 km okcidente de Niŝ. Interese...

Ĝis venonta okazo

Zoran

p.s. Jam dum unu horo mi ne sukcesas konektiĝi kun "eunet.yu" (ĝi troviĝas en Beogrado), la linio ĉiam estas okupata. Mi provos iom pli malfrue.

P.p.s. 06:30 h, la 30an de marto

Komencas la sepa tago. Je la 03:30 ĉi nokte vekis min ia bruo. Dum mi pensadis ĉu ellitiĝi, okazis ankoraŭ unu. Ne estis eksplodo, oni nur audis ian frapon ie relative proksime. Mi ne emis ellitiĝi kaj mi atendis la trian. Ĉar ĝi ne okazis mi restis en la lito.



Per radio elsendo oni ĵus anoncis ke je tiu tempo okazadis atakoj ankaŭ al urboj Vranje kaj Leskovac. Laskovac estas nur 40 km sude de Niš kaj tie falis du rakedoj sed ili ne eksplodis.

Ĝis finiĝis ankoraŭ unu “aktiveca” punkto. Ankaŭ oficiale (per sirenoj) oni anoncis ĉi-tion). Ĝis kiam daŭros ĉi plej nova “paŭzo” ni aŭdos...

La 31an de marto, 22:40 h

La hieraŭa matena ‘paŭzo’ daŭris ĝis la 10:30 h. Ja oni atendis ke la rusa delegacio atingu Beogradon. Poste dum la tago oni daŭrigis ‘regulajn aktivaĵojn’. Nova pli granda paŭzo okazis je la tempo kiam la delegacio devis forvojaĝi.

Kaj nun preskaŭ nenio novas. De dimanĉo oni atakadas tag-nokte. Kosovaj urboj kaj ĉirkaŭoj de Beogrado estas ĉefaj atakceloj. La krom-atakaj trafas diversajn lokojn kaj urbojn. De hodiaŭ ŝajnas ke oni komencas atakadi ankaŭ la trafikvojojn. La aŭtovojo Priština-Podujevo kaj la fervojo Kosovska Mitrovica-Kraljevo estis atakitaj. La

rakedoj ĉi foje maltrafis. Do, krom novaj damaĝoj kaj novaj mortigoj, preskaŭ nenio novas... Kiam la sirenoj anoncas la aer-atako danĝero parto de la loĝantaro iras al la kaŝejoj, la alia (iom malpligranda) parto ne tro zorgas kaj daŭrigas siajn aktivecojn. Tagmezaj kulturaj (per kantado, dancado,...) protestoj daŭras en pluraj lokoj.

Tamen, la plej multo esperis ke la rusa delegacio sukcesos ion fari hodiaŭ. Sed milita parto de usona kaj NATO-administracioj ankoraŭ ne deziras reveni al la paca interkonsentado. Ilia celo estas havi NATO-fortojn sur Kosovo (por la komenco), nenion malpli! Ja preskaŭ tuta Eŭropo jam apartenas al NATO-alianco, nur unu parto de Balkano rezistas... He, mi ĵus rememoris pri Asteriks kaj pri la gaŭla vilaĝo... Ĉu vi jam foje tralegis ian rakonton pri la gaŭloj? Aparte la komenco taŭgas por nia situacio... Do, por milita parto de la administracioj la proponita kompromiso ne sufiĉas (retiriĝo de la armeaj kaj policaj fortoj se la militistaj albanoj ĉesigos la atakojn al la kosova loĝantaro kaj sen veno de ajna NATO-armiano je teritorio de Jugoslavio). Mi ne scias kiel je viaj medioj oni prezentis la enhavon de la pariza “interkonsento” kiun la jugoslavia delegacio ne deziris aŭ povis subskribi, sed la plej baza propono, enhavo de tiu “interkonsento” estas ke oni nepre, dum du monatoj, retiriĝu ĈIUJN (do nek unu policano aŭ armeano havus rajton resti) jugoslaviaj policaj kaj

armeaj fortoj de Kosovo, NATO-fortojn anstataŭis la ŝtatajn organojn kaj la albanoj havus rajton —post tri jaroj— decidi ĉu Kosovo restos parto de Jugoslavio aŭ ekestos sendependa ŝtato, t.e. parto de Albanio! Kompreneble ke la albana delegacio tuj subskribis tian ‘interkonsenton’.

Ĉu vi konas ŝtatestrojn kiu akceptus ĉi tiaj kondiĉoj?

La oka tago baldaŭ finiĝos. La danĝero de aer-atako daŭras (ja oni daŭre ie bombadas - Priština certe kaj plej verŝajne ankoraŭ kelkaj aliaj kosovaj urboj kaj vilaĝoj).

Se la politikistoj restos durkapaj tio-ĉi daŭros iom pli. Krom la demando pri la longeco de la krizo, estas ankaŭ demando pri la vasteco de la krizo. Ĉi dependas de tio ĉu la mondo (restaj partoj de la mondo - Usono ne reprezentas la tutan mondon, almenaŭ ankoraŭ ne...) permesos ke Usono, pere de NATO, gvidas sian propran politikon tra la tuta mondo aŭ tamen ankaŭ por Usono validos internaciaj (supernaciaj/UN) ‘leĝoj’... Usono ne estas ‘patro’ al la mondo. Ĉu mi eraras?

El ankoraŭ neNATO-lando,

Zoran

Niŝ, la 07-an de aprilo 1999, 09:22 h

Ĉi matene la atakantoj estis iom ‘ĝentilaj’. Ili vekigis min nur je la 04:50 horoj. Sed ‘rekompence’ la atako estis pli forta. Entute dudekon da rakedoj trafis la nordokcidentan (industrian) urboparton. (Mia domo troviĝas en la orienta parto). Ja oni supozis ke NATO-fortoj denove atakos ĉi parton (la tabak-

fabriko ne estis fin-detruita). ŝajnas ke nek ĉi foje la atako plene sukcesis...

Hieraŭ vespere mi vizitis, per interreto, kelkajn eksterlandajn inform-organizojn (CNN, BBC, SKY News, Independent). Ĉi matene, ĉar mi jam vekigis (mi ne emis ellitiĝi), mi aŭdis ke la bruado malproksimiĝas kaj mi restis en la ĉambro. Mi aŭdadis la brudadon de la superflugantaj aviadiloj kaj ankaŭ la kontraŭ-aviadila pafado. Kelkaj rakedoj estis trafitaj. Ja estus interese spekti tiun-ĉi ‘batalon’ sed ne eblas pro la konstruaĵoj kaj mi rezignis pri ajna ellirado. La atako daŭris dudek minutojn. Kiam oni plu ne povis aŭdi ajnan aviadilbruon mi ŝaltigis la radion. Nokte kaj frumatene oni povas bone ‘kapti’ pli da radio-elsendojn. Mi uzis okazon kaj mi trovis “Voĉon de Usono —serblingvan eldonon”. La informoj tamen multe ne diversiĝas. Ĉi matene oni informadis ĉefe pri la proponita “ĉeso de la pafado” farita de jugoslavia estraro kaj pri la ekspresa rifuzo de la propono farita de la Usona [NATO]-estraro. Ĉefa kialo por la rifuzo estas ke la propono ne plenigas ĉiujn bezonatajn kondiĉojn kiuj Usono (la s-ro prezidanto) jam antaŭe proklamis. La samon ĉi matene informadis ankaŭ la beogradaj inform-organizoj. Nur la usonaj kondiĉojn oni ne ripetadas. Ja la informiloj jam foje informis pri ili kaj, ĉar la kondiĉoj tute samas oni konsideras ilin superfluaĵ.

Kaj la kondiĉoj vere estas tute ne akcepteblaj por ajna ŝtato, ne nur por Jugoslavio. Nome: reveno de la rifuĝintoj estas en ordo; la duan mi ne povis aŭdi bone; sed la trian kaj kvaran fakte signifas perdon de Kosovo: 3. - ke la

policaj kaj armiaj fortoj plene retiriĝu el Kosovo; 4. -ke anstataŭe je Kosovo oni permesu eniron de la “pac-fortoj” gvidataj de NATO!!! Do, simple dirite ke la ŝtataj organoj foriru kaj ke la NATO organoj venu al Kosovo... Ĉu iu monda ŝtato ja povus akcepti ĉi tiajn kondiĉojn?

Tamen, de hieraŭ vespere la jugoslaviaj fortoj haltigis ĉiujn operaciojn sed NATO daŭrigis la atakojn. Ĉi, lastnokta, atako eĉ estis multe pli forta, ne nur al Niŝ.

Trankvilan tagon

Zoran

P.s. Mi esperas ke oni foje sukcesos reaktivigi la ‘respond-komputilon’, ja mi ŝatus ekscii viajn komentojn, opiniojn, informojn...

De antaŭhieraŭ la ligo kun la ‘respond-servilo’ de eunet-sistemo denove funkcias. La mesaĝoj atendis la transprenon.

Dankon al ĉiuj por la bondeziraj kaj afablaj mesaĝoj.

Niŝ, la 11-an de aprilo, 22:57 h

La sirenoj anonciĝis je la 20:05. La danĝero verŝajne daŭros ĝis la 07a-08a horo matene. Dum lastaj kelkaj tagoj ĉi tiel aspektas la ‘tagordo’... Dum lastaj kelkaj tagoj (de la 07an) Niŝ ne estis celo. Sed ĝis la ‘situacio’ daŭras ĉiam ekzistas ebleco por novaj atakoj, aparte kiam oni ankaŭ ‘oficiale’ anoncas la eblecon.

La 12an de aprilo, 16:36 h

Hieraŭ vespere mi estis tro laca (dormema). Ankaŭ la tempomanko

‘pliaktiviĝis’, pro kio mi ne sukcesas regule (ĉiutage) sendadi la ‘vespermesaĝojn’. Do, mi uzos ĉiun eblecon por la informado. Espereble la eblecoj estos pli oftaj.../

Ja, la supozo estis bona. Je la 07:05 h ĉi matene la sirenoj anoncis la finon de la danĝeron. Ankoraŭ unu trankvila nokto por Niŝ. Sed la sirenoj ne vane anonciĝis. Ankaŭ ĉi nokte estis atakitaj pluraj fabrikoj kaj aliaj ne nepre militaj objektoj je kelkaj urboj (se vi havas mapon de Serbio: Panĉevo, Novi Sad, Kruŝevac, Priŝtina...) Denove estis atakita, kaj trafita, petrol-fabriko en Panĉevo. Brulego okazis. ŝajnas ke ĝi daŭras. Ĉi tiaj atakoj aparte estas danĝeraj por la medio. Kaj ne nepre por la medio de Serbio (la fumo ne konas la landlimoj...).

Je la 10:20 estas anoncita nova danĝero, kiu ankoraŭ daŭras. Pri la hodiaŭaj celoj oni pli detale informos ĉi vespere. La plej ‘karakteriza’ el la hodiaŭaj celoj estas internacia pasaĝera trajno je linio Beogrado-Tesaloniko! La aviadiloj atakis la trajnon je klifo troviĝanta inter Leskovac kaj Vranje. La dua vagono estis rekte trafita, la aliaj estas tre damaĝitaj. Oni ankoraŭ ne scias la ĝustan nombron de la mortigitaj kaj vunditaj...

Lastajn kelkajn noktojn mi aŭskultis la radio-elsendojn el ‘demokratiaj’ landoj —ĉefe usonaj. Mi deziris aŭdi kiajn kaŭzojn oni uzas por pravigi NATO-atakojn. He, nenion novan. Serboj kulpas por ĉio... Nune la plej granda kulpo estas amaso de albanaj rifuĝantoj el Kosovo. Sed neniam oni mencias aŭ

rememoras kiam ĝuste la rifuĝintoj aperis! Kial ne estis rifuĝintoj antaŭ la atako? Kompreneble ke la homoj ne deziras kaj ne povas resti en regiono kie oni per bomboj detruas ĉion. Kaj ne nur albanoj rifuĝas el tiu regiono. (Jam delonge je Kosovo la NATO-aviadiloj kaj rakedoj bombadas ĉion! La urbocentro de Priština estas tre damaĝita, kelkaj partoj eĉ detruitaj. Ankaŭ aliaj kosovaj lokoj estas regule bombadataj...) La plej nova momento: hodiaŭ ‘demokratiaj’ (usonaj) medioj informas ke jugoslaviaj militistoj mortigis du albanojn kaj unu ĵurnaliston je landlima regiono, kaj ke NATO devas gardi pacon tie. Por fari ĉi-tion oni pretigas ankaŭ helikopterojn... Nenia informo ke dum du lastaj noktoj du sufiĉe grandaj grupoj (500-1000 homoj) provis perforte eniri teritorion de Jugoslavio kaj ke supertoj por tiuj grupo donis NATO-aviadiloj per bombado kaj la peza artilerio kiu pafadis el teritorio de Albanio.... Verŝajne serboj kulpos ankaŭ por ĉi-tiu incidento. (Unu brita ĵurnalo antaŭe jam informis ke ankaŭ islamaj ekstremistoj atingis Albanion, krom NATO-militistoj).


Do, ankaŭ demokratiaj informiloj gvidas proprajn inform-kampanjojn. Sed laŭ mi la usona kampanjo estas pli senzorga, pli terura, multe pli agresiva/brutala se oni deziras ion kaŝi... Laŭ la informoj oni povas konkludi ke NATO tre zorgas pri la homaj rajtoj de ĉiuj. Pro la ‘zorgego’ ili pretas detruiri la tutan mondon se iu ne deziras sekvi ilian politikon...

Estus multe pli utile se oni simple donus la monon, elspezitan dum ĉi

milit-kampanjo (oni ankoraŭ ne scias finan cifron - ĝis nun ĉirkaŭ kelkaj miliardoj da dolaroj), al la loĝantaro de ĉi-tiu regiono anstataŭ detruiri iliajn hejmojn kaj vivojn... Ja tio estus vera prizorgo al la loĝantaro... Bomboj ne helpas, ili detruas. Homoj kaj mono konstruas....

Ankaŭ multe pli helpus misinformado, sed je la celo ke homoj ĉi tie komprenu ke eblas ankaŭ komuna vivo. Fakte homoj tie vivis trankvile kaj komune antaŭe. Sed venis la politikistoj kiuj deziris plibonigi iliajn vivojn... Ĉu vi vere kredas ke por la vere ordinaraj homoj tiel gravas la nacieco de la najbaroj?

La danĝero daŭras. Ja ie ‘la mondaj zorgantoj’ daŭre detruas kaj ‘zorgas’ pri



Iam tio estis
unuagrada lernejo

la pli bela kaj pli bona estonteco de la mondo....

Ĝis venonta mesaĝo

Zoran

p.s. 18:10 h, la sirenoj ĵus anoncis ĉeson de la danĝeron.

Mi pardonpetas pro la ‘silento’. Iuj el vi verŝajne jam ekzorgiĝis. Feliĉe, ĉio ankoraŭ estas en ordo, almenaŭ ĉe mi. La ĝenerala situacio tute ne ‘enordas’... La ĉefa kaŭzo por mia ‘silento’ denove estas tempomanko. Ja ĝi daŭras eĉ je militaj kondiĉoj. Nome mi denove laboras je trinkvendejo (la laboro ne malfacilas - mi estas vendisto, sed oni ĉiutage elspezas 6-7 horojn tie...). Antaŭ 3 monatoj mi forlasis la laboron ĝuste pro la tempomanko, sed nun... la firmao de mia patro jam ne funkcias pro la okazaĵoj. Do, li verŝajne havos nenian salajron ĉi monate. Nek je venontaj monatoj se la atakoj daŭros. La patrino laboras je la infanĝardeno kaj ili apartenas al la komunuma buĝeto... do ĝis la komunumo funkcios ili ricevos pli-malpli regulajn salarjon eĉ dum ĉi situacio. Ĝis kiam... ni vidos. Intertempe ankaŭ mi laboros...

La ‘silenton’ helpis ankaŭ troa okupeco de la telefonlinioj. Por konektiĝi kun “eunet” mi ofte (preskaŭ ĉiam) bezonas 1-2 horojn. Ankaŭ, mi daŭre ne ricevas viajn respondojn/reagojn. La ‘respond-komputilo’ daŭre ne reagas. Kaj ĉio jam daŭras iom tro. Kelkfoje eĉ la atakoj ĝenas. Jen, ĵus hieraŭ vespere, je momento kiam mi jam preskaŭ finis la raporton pri la “dektria tag-nokto” komencis atako al Niŝ. En la momento kiam okazis

la unua eksplodo (ne proksime, sed aŭdeble kaj senteble) la komputilo ‘restartiĝis’, t.e la uzata programo rompiĝis (kune kun ĉiuj skribaĵoj) kaj mi devus denove ĉion skribi... nek mi havis tempon kaj emon poste ĉio denove skribi. Krome atako daŭris...

Malgraŭ ĉion ĉi, mi provos esti iom pli regula. Mi nur esperas ke ni havos elektrikon. Se ankaŭ elektrikaj konstruaĵoj estos atak-celoj... mi povos fari nenion. Ĉi ja estus sufiĉe granda problemo... Do

Niŝ, la 06. de aprilo, 21:33 h

He, ĵuste je ĉi momento hieraŭ okazis komenco de la vespera ‘frapo’. Ĉi vespere ankoraŭ estas trankvile. La sirenoj, kio jam estas ĉiuvespera regulo, anonciĝis, je la 19:30, novan aer-atakan danĝeron. Mi daŭre ne tro zorgas pri la sirenoj. Por ke mi reagu oni bezonas ankaŭ la ‘konfirmilojn’ - plian bruon. (La fenestro estas malfermita, la radio estas malŝaltita (mi plu ne sekvas la radio-novaĵojn vespere - “eksteraj informoj” pli gravas) kaj se okazas ian bruon (ĉu aviadil-motora, ĉu bomb-eksploda) mi tuj malŝaltas ĉiujn elektrikaĵojn kaj iras suben, en la kelo, kie ni (la gepatroj, la frato kaj mi) atendas forflugo de la aviadiloj. Ĝis nun, ĉi tion ni faris nur hieraŭ frumatene. Fakte nek pri la “konfirm-bruo” ni multe ne zorgas. Dum la antaŭaj atakoj (ĝis nun du foje) la patro kaj frato restis en siaj ĉambroj (nia domo estas du-etaĝa / tri-etaĝa, laŭ la rusa ‘kalkul’-sistemo/ kaj la ĉambroj troviĝas je la unua /la dua/ etaĝo), la patrino foriras al kelo kaj mi eliras eksteren - mi provadas ion ankaŭ

vidi, ne nur aŭdi (ĝis nun mi ne sukcesis - ĉie ĉirkaŭ la domo troviĝas plur-etaĝaj konstruaĵoj... Mi jam rezignis pri tiaj provoj kaj anstataŭe mi akompanas la patrino en la kelo. Ŝi timiĝas esti sola tie). Hieraŭ, la dektria (malfeliĉa numero, laŭ la 'kredo') tag-nokto, vere estis malfeliĉa por Niŝ. Je la



Ne plu bruo, nun restas
la venomo en la aero.

03:30 vekigis min la bruo. Sekvis la duan. La trian "konfirmon" mi ne atendis, ja estis aŭdeblaj aviadil-motoroj. La familianoj jam vekigis kaj ni translokiĝis suben. Mi kontrolis la videblecojn ekstere... sen ajna sukceso. La bruadon mi aŭdis. Sube ni restis dum daŭro de la atako... ĝis 03:50. Kiam la ĉielo trankviliĝis ni revenis en la ĉambrojn. Dum tago ni ekscis pri la rezultoj de la atako. Estis trafitaj kelkaj konstruaĵoj en la urbocentro. Feliĉe, sen ajna mortigo, sed kun granda damaĝo.

De la naŭa tago (tiam mi eksilentis) oni komencis atakojn al la ne nepre militaj objektoj kaj konstruaĵoj. La unua el tiaj celoj, dum la naŭa mateno, suferis unu ponto en Novi Sad. Tiam komencis ankaŭ civilaj mortigoj. Ankaŭ dum la antaŭaj "militaj" atakoj suferis ankaŭ civiluloj, sed tio estis "nur" kromaj damaĝoj. Sed kun tiu punta atako komencis ankaŭ rektaj civilaj mortigoj. La unuaj estis ĉiuj kiuj troviĝis sur la ponto je la momento de la frapo. Do, la pontoj estis la unuaj. La sekvan tagon oni komencis per la petrolaj 'magazenoj', la bombado de la fabrikoj daŭriĝis kaj daŭras (hieraŭ oni atakis ankaŭ niŝan

industrian urboparton - plej multe suferis la tabak-fabriko (ĉu oni zorgas pri la sano de la nacio!? Ja fumado ne bonas por la sano, kaj se oni detruas la tabak-fabrikoj oni ne povos fumi...) Ankaŭ en Vranje troviĝas granda/forta/signifa tabak-fabriko - ankaŭ ĝi estas damaĝita/kaj la trafikvojoj estis atak-celoj dum lastaj kelkaj tagoj. Antaŭhieraŭ oni uzis ankaŭ "pac-fortojn", situantaj en Bosnio, por damaĝi la fervojojn je la fervojolinio Beogrado-Podgorica! Unu parto de tiu fervojlinio troviĝas proksime de jugoslav-bosnia landlimo. La "paculoj" mortigis la fervoj-gardiston kaj minigis la fervojojn. Ili metis tempminon, sed feliĉe la pasaĝera trajno malfruis....

Bombado de fabrikoj (ankaŭ kemiaj - aparte danĝeraj por medio) kaj nun ankaŭ de la petrolejoj tre endanĝerigas la medion. Ne nur je Jugoslavio. Ĝis nun ne okazis ekologiaj katastrofoj, la celoj ne estas bone trafitaj, sed..., se la bombado daŭriĝos foje ili sukcesos (eĉ hazarde) trafi la ĝustan lokon. Ĵus hodiaŭ oni atakis petrol-fabrikojn en Novi Sad kaj Panĉevo. La fabrikoj estis damaĝataj sed feliĉe la damaĝoj ankoraŭ ne minacas la ĉirkaŭaĵon. Tie estas: la ekologia katastrofo ankoraŭ ne okazis..., sed jam

brul-fumoj estas malbonaj kiujn oni ne kalkulas je la katastrofo. Nek la bomb-eksplodojn oni kalkulas je ekologia katastrofo sed ĉiuj ĉi “malgravaĵoj” tre endanĝerigas la medion!!! Ĉiu militado estas granda ekologia katastrofo!!!

Hireaŭ pligrandiĝis la nombro de la civilaj mortoj. Ĉu pro la nervozo aŭ estas iu alia kaŭzo (intenca faro?!), en du lokoj la atakantoj maltrafis la militaj konstruaĵoj kaj trafis la tute civilajn partojn! Plej multe suferis Aleksinac, urbeto je 30 km norden de Niŝ. Dek tre fortaj bomboj kaj rakedoj trafis la veran urbocentron. Damaĝo estas granda. Oni ankoraŭ esploras la ruinojn. La finan nombron de mortigitaj homoj oni ankoraŭ ne scias. Ĝis nun dudekon. Vunditoj multas.

Ĉu vere tra ‘demokratiaj’ informiloj oni kulpas la jugoslavan registraron pro la plej lastaj elkosovaj fuĝintoj? Ĉu oni mencias ankaŭ ke la fuĝintoj aperis nur kiam la bombado de Kosovo komencis? (Ja la bombado de Kosovo estas regula. Tra Serbio oni atakas diversaj lokoj. Sed la kosovaj celoj estas regulaj). Ĉu la “demokratiaj” informiloj rememorigas ke de la bombado suferas ĉiuj loĝantoj de Kosovo, do ankaŭ albanoj? Kaj ĉu oni vere atakis Jugoslavion nur pro la “humanaj” kialoj? Mi esperas ke la respond-komputilo ekfunkcios baldaŭ, mi tre ŝatus ekscii viajn opiniojn kaj informojn pri la “veraj” kaŭzoj por ĉi NATO-atako al Jugoslavio. Mi memorigas vin: je Kosovo ne vivas nur albanoj. Kosovo estas riĉega je krudaĵoj; la teritorio de meza Balkano estas ankaŭ sufiĉe grava strategia teritorio... Do, kiuj estas veraj kaŭzoj por NATO-atakoj? Mi bezonas klarigojn

La ĉielo super Niŝ ankoraŭ ne bruas. Trankvilan tagon/nokton estas nova adiaŭa saluto ĉi tie...

Trankvila(j)n nokto(j)n ĝis venonta okazo,

Zoran

Niŝ, la 18an de aprilo, 14:22 h

Se mi bone kalkulas hodiaŭ estas ĝuste la dudekkvina ‘milita’ tago (la unua atako okazis la 24an de marto vespere). Do, la afero ‘iom’ daŭras, kaj ŝajnas ke ĝi daŭros. Mi esperis ke ne daŭros, NATO planis ke ĝi ne daŭros (t.e. ke sufiĉos kelkaj atakoj por ĉion fini...) Malgraŭ ĉio, la situacio daŭras. Ankaŭ la danĝero de la aer-atako daŭras. Antaŭ 2 horoj la sirenoj anoncis komencon de la nova ‘ebleco’.

La lasta atako je Niŝ okazis vendredon matene. Je la 04:50 h vekis min la bruo. La eksplodo okazis malproksime. Ankaŭ la venonta. Mi restis en la lito. La supozo estis ke oni denove atakas la nordokcidentan urboparton. Ja la ‘tasko’ ne estis finita dum la antaŭa atako kaj la aviadiloj revenis... Mi aŭskultadis la atakon. Okazis ankoraŭ kelkaj eksplodoj. La aviadiloj tie atakadis per rakedoj kaj super ‘mia’ urboparto ili turniĝadis. Bone mi povis aŭdi la bruon de la aviadil-motoroj. Audiĝis ankaŭ la defend-pafado kiu ĉefe aktivis se iu aviadilo flugas pli malalte. La atako daŭris 20 minutojn. Mia supozo estis bona. Estis atakata industria zono. Tie troviĝas ankaŭ unu kazerno. Krom la fabrikejoj oni trafis ankaŭ unu kazern-konstruaĵon. Se la celo de la atako estis nur fari damaĝon ja ili faris damaĝon, al la pli frue jam damaĝitaj konstruaĵoj. Ĉu mi devas

mencii ke la kazerno jam delonge estas tute malplena? Kaj ne nur ĉi. Ja tio estas tute normale por la militaj situacioj: nek la soldatoj nek la armiloj troviĝas je tiaj lokoj...

Mi mem daŭre tro ne zorgas pro la atakoj kaj tute ne por la sirenoj. Se ili okazos..., ili okazos. Tute ne gravas ĉu mi zorgas aŭ ne zorgas. Do, estas vane zorgi... Aparte se oni estas optimisto, praktika homo kaj krome ĉiam suferas pro tempomanko.

Intertempe ankaŭ la aliaj jam alkutimiĝis al la sirenoj kaj al la atakoj. Nun tiuj kiuj iras al kaŝejoj kiam la danĝero anonciĝas estas ‘malplimulto’. NATO-estroj kalkulis ke per atakoj oni timigos la popolon. La efiko estas tute mala. La homoj ne timiĝis, ili ja koleras al la ‘demokratia’ okcidento - aparte al usonaj kaj NATO-estraranoj. Tial nun ili tute ne zorgas pri eventualaj surteraj NATO-atakoj (novaj NATO minacoj), tute kontraŭe, ili ĝenerale eĉ ‘ŝatus’ ke NATO-soldatoj aperu ĉi-tie ankaŭ persone... Usonanoj havus novan Vjetnamon ĉi tie... Pro ĉi NATO-estroj planas ke surterajn atakojn faru albanoj. Tiam NATO-aviadiloj povos senprobleme kaj senzorge daŭrigi la aer-atakojn. ‘Demokratiaj’ estroj zorgas nur pri siaj civitanoj. Albanoj kaj serboj tute ne gravas. Se NATO vere zorgus pri homaj rajtoj, multajn aferojn ili devus faradi tute alie. Se NATO deziris vere helpi al la albanoj la rakedado estas malĝusta rimedo. Per detruado oni povos fari nenion. Nur pligrandigo de la malfeliĉo.

Vendrede okazis nova civila ‘eraro’. Estas mortigitaj 75 albanoj kaj 20-30 estas vunditaj.

Dum lastaj du tag-noktoj estis atakitaj multaj lokoj. En kelkaj urboj estis atakataj industriaj objektoj troviĝantaj en la urbocentroj. Estis damaĝataj kaj detruataj multaj privataj domoj.

La lastan nokton okazis nova atako al la petrol-fabrikoj en Novi Sad kaj Panĉevo. Grandaj brulegoj ekis. En Panĉevo estas trafita ankaŭ kemia fabriko. Brulego ekis ankaŭ tie. La fumego danĝerigas la loĝantarojn de Panĉevo kaj Beogrado. Pristina regule estas atakata, ĉiutage.
Soran Ĉine
Ĉi tie ĵuras la unuan parton de la raporto. Ni kalkulas, tamen, kun pluaj raportoj de Jugoslavio Ekstere estas bela, suna, printempa tago.



Tiuj albanaj *patriotoj* mortus en elektra seĝo, se ili agus en Usono. Malgraŭ *Pax NATa*, ili agis en la serba bordo la 10-an de septembro 1999.

La trobadoroj,

de Johano Luko Tortel

Ni ĉiuj pli malpli bone konas la mapan figuron de la lando Francio. Ĝi similas sesangulon; cetere ĝi estas ofte metafore nomata tiel en la francaj amas-komunikiloj. Malgraŭ tiu forte regula aspekto, tiu lando havis nenian antaŭdestinon por fariĝi la teritorio de la nuna franca ŝtato. La nun nomita franca lando etendiĝis ĝis la Rejnobordo sub la regado de la imperiestro Karlo *la Granda*. Ĝi poste limiĝis al sia okcidenta parto dum la regno de lia filo Karlo *la Senhara*.



Poste venis longa periodo de malprogreso de tiu reĝa potenco, ĝis kiam la reĝa teritorio limiĝis al centra regiono inter Parizo kaj Orleano. Samepoke instaligis la tiel nomita *feŭda sistemo*, kies ĉefa karaktero estis la konata diserigo en landetoj kun lokaj estroj plenpotencaj sed tamen socie interligitaj horizontale kaj vertikale per kompleksa reto de interdependo. Tiam la nocio *Francio* ne ekzistis. Tiu nocio de nacio, moderna en la historio, estas kuniĝo de gento, tio estas, popolo genetike, lingve kaj religie homogena, sur difinita teritorio regata de homogena politika sistemo.

Proksimume du mil jarojn antaŭ nia erao, gaŭloj konkeris la nunan Francion, kaj trudis sian lingvon kaj kulturon. Ĉe la ekerao la romianoj konkeris la landon, en du ondoj disaj de unu jarcento: unue parton de la Sudo, poste far Cezaro la tuton ĝis Rejno. Ili trudis sian latinan; tamen tiu lingva invado ne estis rapida; el ekleziaj arkivoj oni scias, ke la gaŭla lingvo restis en uzo en la kamparoj ĝis la 5-a jarcento. Tiu latinlingvo ne estis la klasika cicerona, sed slango de veteranoj, krudaĵoj de negocistoj, ĵargono de ŝtataficioj. En kelkaj jarcentoj ĝi fariĝis ne plu latina, sed tute alia lingvo, kiun oni nomas nun *romanika*, kaj kiun la tiamaj kleruloj simple nomis la *vulgara*.

Grava faktoro estis la ĝermanaj invadoj de la 4-a, 5-a kaj 6-a jarcentoj. Ili kunportis lingvon tre malsimilan de la romanika, kaj la miksiĝo kun la loka romanida naskis ĥaosan kreoliĝon inter ambaŭ lingvospecoj; sed strange, dupartan, duteritorian kreoliĝon. Se horizontala ondumanta linio estas strekita, proksimume meze de nia preparolita sesangulo estus difinitaj norda lando, en kiu oni parolis la *lingvon de Oil* [ojl] laŭ la maniero diri *jes*, kaj suda lando, kie oni parolis la *lingvon de Oc* [ok] samdifine.

Mistera restas la kaŭzo de tiu duiĝo, kiu estas sufiĉe atentinda: ambaŭ tiom malsimilis, ke nordanoj kaj sudanoj ne interkompreniĝis. Kiel tion klarigi? La unua tezo, de *von Wartburg*, apogas sin sur la fakto, ke la suda lingvo restis gramatike kaj fonetike tre proksima de la latina kaj de ĝia ido, la tiam romanika. Von Wartburg do simple konkludas, ke la sudo, multe pli profunden romanigita ol la nordo, pli bone rezistis al la invandintaj lingvoj, kaj ke visigotoj, burgundoj kaj aŭstrogotoj rapide asimilis la romanidan lingvon kaj kulturon. Male en la nordo, la frankoj venis poste, pli multenombraj, en regionojn malpli romanigitajn.

Tamen, la romanida civilizacio estis grandaparte urba. Do, devis ankaŭ troviĝi en la nordo kvazaŭ insuletoj de lingvo *Oc* en la urboj kreitaj de romianoj. Nu, tute ne; male la lingva limo estas tiel kruta kiel akuta interŝtata landlimo.

Tiun teorion klasikan, nomitan *de la supertavolo* (tavolo de popolinfluo) venis kontraŭi la pli modernan teorion de la *subtavolo*, kiu opinias laŭ Auguste Brun, ke ĉiam ekzistis, jam antaŭ la gaŭla invado, du malsimilaj popoloj en Nordo kaj en Sudo. Tion atestas observadoj de arkeologoj, de geografoj, de historiistoj: eĉ nun plures-tas diferencoj en la manieroj kultivi la kampojn, konstrui la vilaĝojn, la domojn, la tombojn, la vojojn, la urbojn, prizorgi la bestojn, jungi ilin, plugi, kaj tiel plu. Sed ĉu post tiom da jarcentoj kaj invadoj, tiu pradiferenco de popoloj sufiĉus pro krei du apartajn lingvojn?

La mistero restas do tuta; sed estas fakto; ekde la frua Mezepoko ĝis la 20a jarcento, estis parolataj en Francio du malsamaj lingvoj; norde la *Oil*, sude la *Oc*. Estis kompreneble aliaj lingvoj, kiel la bretona, la vaska, ktp., sed nombre ili ne havis la gravecon de *Oil* kaj *Oc*, kiuj dividis preskaŭ la tutan teritorion. Tio estas ofte nekonata, ne nur eksterlande, sed en la nuna Francio mem; oni oficiale kaŝas tiun dividon por ne agnoski la duoblan kulturon nordan kaj sudan; oni volas ignori la sudan, kiun oni perforte malaperigis.

Kiuj estas la skribaj mejloŝtonoj de tiuj du ĉefaj lingvoj? En la okcitana la unua postrestanta teksto —se ne okazos alia malko-

vro— estas la *Kanzono de Sankta Fida*, priskribanta la martiron de kristana junulino. Ĝi datumas de la 11-a jarcento ĉirkaŭ 1060-1080. La teksto en 493 oksilaboj arigitaj po strofoj estas teknike bona kun versoj rimitaj, dum la samepoka fama *Kanzono de Rolando*, ĉirkaŭ 1100 en *Oila* lingvo (dialekto normanda) uzas nur pli arkaisman asonancon [rimo = sameco inter du versofinoj de la lasta akcenta vokalo kaj de ĉiuj ĝin sekvantaj sonoj, dum asonanco estas nur sameco de la akcenta vokalo, sed ne de la postakcentaj konsonantoj:

dua - ĝua; kria - iras. **Parnasa Gvidlibro**]. La pli frua *ojla* teksto, *Vivo de Sankt' Aleksio* estas tiel nur asonanca.

Ne vere estus diri, ke sub pluridialekta vesto regis nur du lingvoj sur la teritorio de tiu sesangulo, kiu —ni ripetu—

tute ne konstituis ŝtaton, eble male eĉ ĝi havis ĉion por ne fariĝi ŝtato!

Tria lingvo havis ĉefan rolon en administracio, juro, kaj notariaj aktoj: la latina. Oni nun malfacile imagas la unuarangan rolon de tiu lingvo en Mezepoko; ĝi estis la cemento de la ĉiopova eklezio; la lingvo de la universitatoj en la tuta Eŭropo; la lingvo de la kleruloj, filozofoj kaj poetoj. Ĝis la 11-a jarcento ĉiuj poetoj verkis latine. Tiu poezio estas nun forgesita, krom de specialistoj, sed multaj kleruloj, cetere ĉiuj klerikoj, tio estas, altnivelaj pastroj, verkis latinajn poemojn, ekzemple la francaj abatestroj Fortunat, Robert de Lavardin, aŭ la germana abatinino Hildegarde von Bingen, pri kiuj studoj lastjare aperis en **La Gazeto** kaj en **Kontakt**.





Preleginto Tortel

Oni ne miru, ke nur klerikoj kapablis verki; nur ili sciis legi kaj skribi; tiuj artoj —ja oni parolu pri arto, kiam oni memoras, ke temis pri manskribado— estis instruataj

nur en monaĥejoj, kie estis la solaj lernejoj kaj bibliotekoj.

La granda amaso da kampanoj estis tro mizeraj por eĉ havi ideon pri libroj, kiuj ege kostis; en la urboj la junaj metiistoj rapidis lerni la profesion scion, kiu estis ekskluzive pergesta kaj perimita; la junaj nobeloj ĵus forlasintaj la infanaĝon tuj lernis rajdadon kaj skermadon. Eĉ grandsinjoroj, dukoj, eĉ reĝoj ne sciis legi. Por kia bezono?

Kiam ili —tre malmultaj— kapablis tion, kiel la franca reĝo Karlo la Kvina, fama ĝuste pro tiu kapablo kaj la posedo de biblioteko, ili ofte ne sciis skribi, kio konstituis plian nivelon de klereco. Ni ankaŭ memoru, ke tiam oni ne sciis legi nur *per la okuloj* kaj ke oni devis laŭtleĝi tekston por ĝin kompreni.

Resume, en la deknua jarcento supera socitavolo de klerikoj parolas kaj skribas la latinan; la resto de la homoj (nobeloj, burĝoj kiuj ekaperas en la urboj, negocistoj, riĉaj metiistoj, kaj la popolo) nek scipovas la latinan, nek scias legi aŭ skribi, kaj konas nur sian lokan lingvon, plejofte dialekton el al du grandaj grupoj *Oil* kaj *Oc*.

Sed jen aperas neceso. Same kiel en la komenco de nia erao en la unuaj jarcentoj la episkopoj petis, ke la pastroj prediku en la gaŭla lingvo, por ke la popolo komprenu, same tiel ĉirkaŭ la deknua jarcento la eklezio insistis, ke la pastroj instruu la popolon pri kristanismo. Tiucele monaĥoj fabrikis *kanzonojn*, tio estas, versojn kaj muzikon por akompanado, por ke la pilgrimantoj, kiuj

tradormis en la monaĥejoj, povu tiel lerni, admiri kaj parkerigi faktojn, aŭ pli ĝuste legendojn pri la historio de kristanismo. Ĝuste tiel naskiĝis en ambaŭ lingvoj kanzonoj kiel tiu de Sankta Fida en *Ok* aŭ tiu de Sankt' Aleksio en *Ojl*. Tio estis la unua bato al la ĉiopova latina: oni povas ankaŭ verki en la vulgara ĉiutaga lingvo!

Tiam okazis en la Sudo fenomeno socia iel revolucia: la nobelaro ekkonfidis siajn multajn infanojn dum kelkaj jaroj antaŭ la adoleska tempo al monaĥejoj por edukado. Komprenoble tuj eĉ la viriĝa tempo oni tiris ilin el la klerikaj manoj por transdoni ilin al la vere necesaj instruistoj, la militistoj. La seriozaj aferoj estis rajdado, skermado, turnirado, militado. Sed tio lasis tamen kelkajn antaŭajn jarojn; se l' infano estis kapabla, li havis la tempon lerni legi, skribi kaj kanti (en la latina, komprenoble). Kanto kaj muziko estis esencaj por taŭga dia servado. Jam delonge Papo Gregorio la 1-a donis grandan puŝon al la ekleziaj ĥoroj; la tiel nomita *Gregoria Ĉanto* restas de tiam fama.

Kial tio okazis? El la flanko de la nobeloj sendube rolis la deziro favorigi al si la ekleziaron tiam tutpotencan; oni bezonis la indulgon kaj favoron de la servistoj de Dio, pro la multaj okazoj de pekado, ĉu en milito, ĉu en ĉiutaga sinteno al virinoj, al kampanoj, al subuloj, kiujn oni traktis tre perforte. Eble ankaŭ rolis la emo ne plene fidi al monaĥoj aŭ al notarioj en la redaktado de la aktoj, eĉ geedziĝoj, mortoj kaj sekvaj heredoj; tiu, kiu scipovas legi, kapablas scii pri kio li subskribas. El la flanko de la pastraro, la intereso estis mona: tiu kelkjara restado tute ne estis senpaga! Ĝi ankaŭ estis alianca: pli bone estas amiki kun la loka grandsinjoro; fina kaj ne sengrava estis la deziro rekruti junajn nobelojn kiel novajn monaĥojn; tiu rekrutado estis ankaŭ finance alloga por la monaĥejo, kiu pro l' okazo ricevis grandan

monsumon de la familio de la nova nobela-devena monaĥo, kvazaŭ ia doto.

Pri tiu edukado, la abatejo Sankta Martialo, en Limoĝo, kie okazis antaŭ tri jaroj la kongreso de SAT-Amikaro, grave rolis pro la alta nivelo de sia instruado. La junuloj elirintaj el ĝi perfekte legis, skribis, kantis, muzikis —tiu tempo vidis ankaŭ la aperon de novaj instrumentoj de muziko— kaj eĉ sciis tre bone verki latinajn versojn; pli mirige, ili ne plu prikantas la Madonon latinlingve, sed surterajn virinojn, grandsinjorinojn, ofte edzinojn de la loka nobelestro, kaj en la loka ĉiutaga lingvo.

Oni malfacile nuntempe taksas la revoluciecon de tiu fenomeno. Ĝi signifas, ke la nobelaro fariĝis finance sufiĉe komforta, por lasi al si tempon de distriĝo; intelekto sufiĉe klera, por ne nur ŝati ĉasadon kaj militon, sed ankaŭ artaĵojn; ke ĝi nun kapablas sinteni al virinoj respekteme, preskaŭ adore —almenaŭ en kanzonoj—. La junajn homojn kapablajn verki tiujn kanzonojn oni nomis *trobadoroj*.

Tiu vorto originas el la okcitana: *trobar*, tio estas, *kapabli inventi kanzonojn*. La verbo *trobar* mem devenas de la latina mezepoka *tropare*, verki tropojn (vortfigurojn). Tiuj altnivelaj kanzonistoj unue aperis en Limoĝo, la regiono de Limoĝo, kaj verkis en la loka dialekto. Tre rimarkinde, iliaj imitantoj kaj posteuloj en la tuta Sudo uzos la saman limoĝan dialekton, ĉu ili estas gaskonoj, provencanoj, katalunoj, ktp. Tiu varianto limoĝa de la okcitana restis beletra komuna esprimilo de la tuta Okcitanio. Kiel *la Biblio* de Lutero unuecigis poste la germanan lingvon, la trobadoraj tekstoj unuecigis la beletran lingvon de la suda lando. Tio estu por ni esperantistoj memorinda: la tiama literaturo kreis la unuecan lingvon, kiun la literatura klaso komprenis; kaj la trobadoraj interpretistoj disvastigis ĝin de kastelo al kastelo, de kortego al kortego. La literaturo

kreis, unuecigis, disvastigis la lingvon. Same kiel pri Esperanto.

Tiuj trobadoroj estis nobeloj aŭ altklasaj homoj. La unua (el kiu restas tekstoj, ĉar tre certe li havis antaŭulojn) estis Vilhelmo la 9-a, Grafo de Piktavio, Duko de Akvitanio, unu el la plej potencaj nobeloj de la epoko, multe pli ol la reĝo de la tiama Francujeto Jaufre Rudel, de Blaye, ĉe la buŝego de rivero Garono, estis princo. Ĉu vere princo, aŭ simple *la unua*, la ĉefo, laŭ la latina etimologio? Ĉiel, grandsinjoro. Rambault d'Aurenĝa estis ankaŭ plej potenca feŭdomastro; sed la potenco kulminis en la personoj de Alfonso la Dua, Reĝo de Aragono, kaj de Rikardo *Leonkoro*, filo de la angla reĝo.

Pli poste ekbrilis etnobeloj, kiel Bernard' de Ventadorn, Bernard' de Born aŭ Gaucelm Faidit. La arton de trovado praktikis ankaŭ klerikoj kiel Folko de Marsejlo, kiu poste fariĝos episkopo de Tuluzo dum la tiel nomita *albigensa milito*; kiel Peire Cardenal, Joifre de Foixa, Daude de Pradas... Riĉaj komercistoj kiel Bertrand' Carbonel, Pistoleta; burĝanoj kiel Peire Vidal aŭ Peire Ramoun de Tolosa. Tio pravas ian demokratiĝon de la *trobadora arto*, se tiu vorto havas senceon pri tiu fora Mezepoko. Tamen, la fakto, ke simplaj kantistoj de tiuj kanzonoj —ĉar kompreneble la grandsinjoroj ne vojaĝis por kanti siajn poemojn kaj lasis tion al profesiaj muzikistoj kaj ĵonglistoj— mem ekverkis poeziaĵojn kaj ekkomponis ariojn kiel Marcabru aŭ Cercamon estas fina pruvo, ke la trobadora arto plene enradikiĝis en la tiama okcitana socio. Nur kamparanoj ne troveblas en la trobadoraj vicoj: iliaj tiamaj teruraj vivkondiĉoj facile klarigas la kialon.

Eĉ troviĝis kelkaj virinoj inter ili: sep restas konitaj: Grafino de Die estas la plej renoma. Sendube multaj aliaj ekzistis, por ĉiam forgesitaj; oni sciu, ke nun restas nur 2 500 trobadoraj kanzonoj; oni konas la akompanan muzikon nur de 400 el ili; nur 350 trobadoroj restas konitaj; multaj per nur unu

kanzono, ofte sen muziko. Oni facile komprenas, ke tio estas nur la videbla parto de glacimonto; sendube amaso da kanzonoj kaj da nomoj perdiĝis ĉe la detruo de tiu civilizo, tiom pli, ke multaj el tiuj tekstoj ne estis skribitaj, sed konservitaj nur per la orela memoro kaj per la parola ripetado.

La konservita muziko estas ankoraŭ misterplena. Ĝin oni skribis per la epokaj kvadrataj notoj, nomitaj *neŭmoj*; lin oni uzis ankaŭ por la gregoria ĉanto. Tiuj neŭmoj indikas la altecon de la sonoj, sed neniel la daŭron. La plej malfacila punkto restas tiu de la grupoj de notoj, kiujn oni kantu sur la sama silabo; la muzikologoj nomas ilin *ligaĵoj*. Tiu trobadora muziko estis tre parenca kun la eklezia muziko, kaj precipe kun la tiel nomita polifonio. La ŝafistaj kantoj de Sicilio aŭ de Korsiko estas similaj al tiu trobadora muziko.

Alia malfacilaĵo venas el la instrumentoj. Malmulte kostaj, malbone prizorgitaj, ili tre malbone konserviĝis, kaj estas nun tre malfacile retrovi iliajn sonojn. Ekzistis kordinstrumentoj; liuto, gitaro, liro, vjelo (prviolono); blovinstrumentoj: kornoj, trumpetoj; batinstrumentoj: tamburoj, timbaloj. Orgenoj jam ekzistis, kaj ankaŭ orgenetoj.

Retrovi la muzikon de tiu epoko estas do vera arkeologia laboro; tamen, tiun spiton kelkaj modernaj muzikologoj ne hezitis alfronti, kaj kelkaj orĥestroj provas revivigi por ni tiujn forgesitajn trobadoraĵojn. Jen ni aŭdu arion el tia disko...

Se la neindiko de la daŭro de la notoj lasis multe da libereco al la interpretisto de la kanzono rilate la muzikan parton, la afero estis tute alia pri la versoj de la teksto. La versfarado estis ekstreme rigora kaj kompleksa. La verso plej uzata estis la deksilabo, kiu plene akordiĝis kun la tre densa okcitana lingvo. La poemoj dividiĝis en strofoj, kaj la versoj ne nur rimis interne de

la strofo, sed ofte la rimoj troviĝis de unu strofo al alia, foje kun regula ŝanĝo de unu strofo al alia. Ekzemple la rimo de la unua verso de la unua strofo fariĝis la rimo de la dua verso de la dua strofo, poste la rimo de la tria verso de la tria strofo... En la interno de la versoj ofte aperis aliteracioj (sonripetoj); ankaŭ reuzo de la lasta vorto de strofo ĉe la komenco de la sekva, aŭ male ĉe la fino de la unua verso de la sekvanta strofo (*rimas capcaudadas* aŭ *capfinidas*). Tia komplekseco faris la poeziaĵon vera teksaĵo; la trobadoroj mem uzis tiun vorton: *entrebescament*, kiu ĝuste signifis teksaĵon. Neniam la franca poezio atingis tiun nivelon de rafiniteco, krom eble ĉe la 20jarcenta poeto Aragon, kiu sciis krei tiajn reaperojn de rimoj, tiajn internajn rimojn aŭ asonancojn, imitante precize la teknikon de la trobadoroj.

Kion prikantas la trobadoroj? Plejofte amon, al damo ofte pli aĝa, socie pli altanivela. Tiu amo baziĝas sur admiro kaj respekto; ĝi estas platona, almenaŭ teorie; ĝi promesas fidelecon al la elektito, kaj asertas, ke la amanto trapasos ĉiujn eltenindaĵojn por meriti la amon de la adorata grandsinjorino. Do reliefigataj estas la kvalitoj de la kavalirecaj medioj: respekto al la hierarkio, sindonemo, eltenemo, kuraĝo, kortega ĝentileco, perfekta obeo al la amatino konsiderata kiel vera suzereno, tio estas, estranta grandsinjoro; cetero la poeto nomas sian amatinon *Midons*, kio ĝuste signifas: suzerena Moŝto, kaj ne suzerenino! La plej malŝatataj malvirtoj estas avareco, ĵaluzeco kaj misklaĉado far de la aliaj korteganoj. *Lauzengier*, misklaĉulo, estas la plej granda fino! Malstabila ekvilibro: la poeto devis prikanti flatitan sinjorinon, kiu ne devis respondi al tiu amo, kaj la edzo de la damo ne rajtis interveni, fidante nur je la fideleco de l'edzino; dume neni alia devis enmiksiĝi en tio per klaĉoj aŭ denuncoj! Bernard' de Ventadorn tamen estis forpelita de sia suzereno ĉar la suzerenino ne restis sufiĉe

malvarma antaŭ la kanzonoj. Malfeliĉa trobadoro estis eĉ punata per tranĉo de la lango! La turmentisto eble kompatis, kaj nur ŝajne obeis, ĉar tiu Peire Vidal povis rekanti..., sed en alia kortego!

Retroviĝas la ĉefa temo de la feŭda literaturo: la elprovado, kun ties korolarioj: la eltenemo kaj la ĉiam renoviĝanta arda kuraĝo.

La plej ofta poemomodelo estis la kanzono, kun ses strofoj el ses deksilaboj. Ĝia temo estas plej ofte gurdita: la poeto laŭdas la



revenon de la bela sezono, kun la naturo plena de ekfloradoj kaj de birdaj amkantoj, dum li male reliefigas sian malesperon antaŭ la deteno de la plej aminda virino, kiu rifuzas aŭskulti lin.

Tamen ekzistas aliaj temoj ol la prikantado de la rafinita amo (*la fin' amor*). La trobadoro ne ĉiam senfine atendas la kompaton (*merces*) de l' amata. En la ĝenro tagiĝo (*alba*) la temo estas la kruela reveno de la taglumo, kiu devigas la amanton forlasi la liton de sia amatino; la gardista kanzono (*pastorela*) ĝenerale priskribas lertaĵon de izola ŝafistino por elturniĝi el la premo de alveninta sola kavaliro; la *tenson* rivala dialogo kontraŭstarigas du trobadorojn, kiuj inter si luktas kante pri antaŭelektita temo; fama restis la *tenson* inter Raimbaud de Aurenĝa kaj Guiraud de Bornelh pri la maniero verki: ĉu klare (*trobar leu*) ĉu hermetike (*trobar chus*). La poezio evoluis, laŭlonge de la 150 jaroj de la trobadora epoko; kelkaj poemoj de la lasta periodo estas preskaŭ surrealismaj. Ekzistas ankaŭ la *planh*, la plendo, ofte pri la morto de suzereno aŭ de grandnobelo; ankaŭ la *sirventes*, defenda pamfleto, kiel tiuj de la lasta periodo, kontraŭ la abomeninda

invado de la francoj, kiuj venis priplagi la landon, okaze de la Albiĝensa Krucomilito. Nin modernulojn amuzas la erotikaj poemoj, kiel tiuj de Vilhelmo la 9-a; kaj male plej malplaĉas la abomeninda ĝojo de Bertrand' de Born, kiu glorigas la fian plezuron de militado, antaŭ la kadavroj de batalintoj trapikitaj per lancoj kaj cirkaŭitaj de izolaj senrajdulaj ĉevaloj.

Dank' al la trobadora epopeo, la suda tiutempa civilizo atingis tre altan nivelon de poezio, muziko, kaj rafiniteco. Amuzaj estas la vortoj de okcitana nobelo vizitinta la kortegon de la franca reĝo; ĉe la reveno, li diris, ke la franca reĝo estas agrabla persono, sed ke lia trobadora kortego estas nur *porbarona ĉirkaŭbarejo*, kavazaŭdirante porŝafa aŭ eĉ por ankoraŭ pli krudaj bestoj!

En la fino de la 12-a jarcento kaj la komenco de la 13-a, Okcitanio estis do la plej civilizita lando de Eŭropo. Ĝi influis la nordan parton de la nuna Francio, kie aperis la truveroĵ (*trouvères*) kaj Germanion kun la *Minnesänger*, kiu imitis ilin.

Ĉu la trobadoroj mem ricevis influon? probable tiun de Al Andalus, la araba reglando, kiu tiam en la suda Hispanio brilis en la islama mondo. Ili certe interŝanĝis influojn; tion pruvas similaĵoj inter la trobadora kanzono kaj la *zagalo* de l' arabaj poetoj; oni ankaŭ trovas bildojn el manuskriptoj aŭ vitraloj montrantaj arabajn kaj okcitanajn poetojn en kunaj aŭ rivalaj kantoj. Tiuj renkontoj devis esti oftaj; male al komuna opinio oni multe vojaĝis en

Mezepoko, ofte foren (oni nur pensu pri la senĉesaj pilgrimoj) kaj interŝanĝoj inter kortegoj estis kutimaj. Cetere jam komenciĝis la krucomilitoj ĝis Oriento, kie okcidentaj kavaliroj instalas feŭdobienojn en islamaj teritorioj kaj al kutimiĝis kun la lokaj moroj, interlie kun kantata poezio akompane de muziko.

Sed alia kruela krucomilito ruinigis la Sudon kaj malaperigis la trobadorojn. Ĉe la

fino de la 12-a jarcento aperis tie herezio, de inspiromaniĥesma, kiu estis facile tolerata de la loka kristana majoritato, pro la bonega konduto de l' adeptoj, kiuj ofte estis grandnobeloj. La Katolika Eklezio maltrankviliĝis, kaj la Papo vane sendis predikistojn post predikistoj, por provi konvinki la loĝantojn denunci la tiel nomitajn albiĝensojn kaj forpeli ilin. Antaŭ la malbonvolo de la popolo kaj de la nobelaro, kiuj kaŝe rezistis al tiu ostracismo kontraŭ estimindaj homoj, Papo Inocento la Tria deklaris Sanktan Krucomiliton kontraŭ la grafo de Tuluzo, posedanto de la plej granda parto de la Sudo. Lin anatemis la Papo, kiu deklaris liajn bienojn konkereblaj *laŭ la bonvolo de Dio*.

Je tiu morala rabopermeso amasiĝis privata armeego da aviduloj (pli ol cent mil soldatoj aŭ banduloj) kiuj invadis la Sudon laŭ sinsekvaj ondegaj de amasmurdoj, bruligoj, detruoj ĝisfundaj de rikoltoj, vilaĝoj, kasteloj, urbetoj kaj urboj. Post dudeko da jaroj de milito (1207-1229) la lando daŭre rezistis, komplete ruinigita; tiam la Franca Reĝo, kiu ĝis la lasta momento rifuzis interveni, devigis la Grafon de Tuluzo edziĝe forcedi sian ununuran filinon al ano de la reĝa familio. Laŭ la kutimoj tiamaj,

ĉiuj tuluzaĵaj bienoj tiel pli poste apartenos al la reĝa krono. Plie, ĉiuj konkeritaj teritorioj ne plu apartenos al la konkerintoj, sed al la reĝo mem; rabisto rabistojn rabis!

En tiu tempesto la vivkondiĉoj necesaj por la florado de la trobadora arto tute malaperis. Kelkaj trobadoroj eskapis trans la montojn kaj daŭrigis sian arton eksterlande, en Italio, Katalunio, Aragono aŭ eĉ Portugalio. Sed sen sia socia radikaro ilia talento malaperis kun ili, sen posteuloj.



Kiujn lecionojn ni esperantistoj eltiru el tiuj eventoj? Ke literaturo firmigas lingvon, kiu sen

ĝi restas nestabila ordinarajo, vulgaraĵo, kiel oni tiam (kaj ankoraŭ nun) diris; ke lingvo sukcesas nur, kiam ĉiuj socitavoloj uzas ĝin (ĝuste tio estas grava manko en Esperanto, lingvo de etklasaj homoj, al kiu mankas sociaj potenculoj), ke malbonaj socikondiĉoj povas malaperigi lingvon. Sed ĝuste ĉar ĝi ne estas lingvo de iu difinita popolo, Esperanto ne riskas malaperi, kiam uzantoj malaperas aŭ kunfandiĝas en alian etnolingvon; senĉese kaj senfine, la trudherbo Esperanto fenikse repaskiĝas!

Karlomy Vary, la 27-an de julio de 1999




Enkonduko en muzikon

Instrumentoj

Kantistoj estis tre serĉataj je antikvaj tempoj, pro tio, ke ili povis moligi akrajn sentojn ĉe siaj aŭskultantoj. Tamen, ne ĉiuj povas kanti bele, ĉar necesas dediĉi multe da tempo kaj peno por akiri bonan voĉon. Kiel rimedo al bela voĉo, oni inventis instrumenton por imiti la homan voĉon, kaj tiel *kanti* per tiuj iloj. Kvankam ne pruvite, ŝajnas, ke la unua muzikilo estas **fajfilo**. Almenaŭ la plej malnovaj eltrovaĵoj muzikaj estas fajfiloj faritaj de ostoj el bestoj kaj eĉ homaj. Tamen, estas tiel facile fari fajfilon el kano, ke mi ne certas, ke malpravas tiuj, kiuj diras, ke kanfajfilo estis la unua instrumento muzika.

Ĉiokaze, fajfilo faras muzikon ĉar aero estas blovita kontraŭ strangolaĵo ligna ene de la kano (ĉu pro neregulareco de la interna parto de kano, ĉu enmetita de la faristo). Kiam oni blovas forte, la aero vibras tre akute, sed kiam oni blovas malpli forte, la aero vibras malakute —*base*—. La sono aperas proksime de la ekstremo, kie oni blovas, kaj la cetera parto de la fajfilo multobligas la laŭteco de la sono, kaj iĝas tiel *resona skatolo*. Ju pli longa estas tiu skatolo, des pli malakuta la fajfo estas. Pro tio, oni faras truojn laŭlonge de la fajfilo, kaj tiel oni kreas la diversajn notojn muzikajn. Estas multatipaj fajfiloj hodiaŭ, kaj eble ni ĉiuj aŭskultis sudamerikan fajfilon surstrate aŭ eldiske. En la *serioza muziko* —miriga eŭfemismo de etnocentrismaj eŭropuloj— estas du tipoj, kiuj ankoraŭ konkurencas: la germana kaj la angla. La sola diferenco inter ili estas la loko de la truoj: ambaŭ havas sep truojn je la antaŭa parto, kaj unu je la dorso, kaj oni kontrolas ĉiujn per siaj fingroj. Kelkaj esperantistoj nomas fajfilon **bekfluto**, sed mi



ne ŝatas tiun nomon, ĉar tiu nomo ankaŭ esprimas malŝateton al tre nobla kaj fleksebla muzikilo.

Fajfilo apartenas al la *instrumentoj de vento* (ankaŭ nomitaj *blolvaj* pro memevidentaj kialoj), kaj ene de la ventaj instrumentoj, al *ligna* familio. La aliaj membroj de la **LIGNA FAMILIO** estas: **fluto** —surprizinde nun oni faras ĝin de arĝento aŭ ŝtalo, sed *iam* oni faris ĝin ligne—, **klarneto**, **hobojo**, **saksofono**, **fagoto** kaj **kontraŭfagoto**. Ankaŭ —pro sia ofteco en moderna orĥestro— ni povas konsideri **fluteton** aparta instrumento, kiu sonas ekzakte ok notojn (oktavon) pli akute ol normala fluto.

Parence al venta ligna familio estas tiu **VENTA METALA**, kiu ankaŭ estas tre malnova en historio: **trumpeto**, **trombono**, **korno**, **klariono** kaj **tubjo**. Mi nomis ilin el plej akuta al malplej.

Estas instrumentoj kiujn oni kontrolas per klavaro. Ili estas, kompreneble, la **KLAVARA FAMILIO**: **orgeno** —ekskluzive uzitaj en preĝejoj dum multaj jarcentoj—, **piano**, **harmoniumo**, **akordiono**, kaj **koncertino** (fakte malgranda akordiono, kiu havas alian formon, ankaŭ).

La **PERKUTA FAMILIO** estas instrumentoj kies sonon oni atingas batante aŭ frapante ilin: **tamburo**, **timpano**, **tamtamo**, **tamburino**, **marimbo**, **ksilofono**, **gongo**, **tubofono**, **vibrafono**, **kampaneto**, **celesto**, **dulciton**, **triangulo**, **kastanetoj**, kaj **cimbalo**.

Evidente, ĉiu familio havas pliajn membrojn, sed ili devenas el tiuj menciitaj. Ni revenos al ili en postaj ĉapitroj de nia *Enkonduko en Muzikon*, sed venontfoje ni priskribos la *Kordan Familion*, plej favorita de gravaj muzikfaristoj eŭropaj de la estinto.





BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO

Retskribu al
hale@distrito.com

<http://www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm>

<http://esperanto.dragonfire.net/kajeroj.htm>

1

Mi ŝatas virinojn
el tuta la ter',
mi ŝatas virinojn,
jen mia mizer'.

Mi ŝatas ridante,
plorante, dormante,
kisante, batante,
en ĉia sinten'.
Ludante kun ili
min plenas feliĉ',
**mi petas, virinoj,
ke vi venu al mi.**

2

Mi havas belamantinon
kaj dum ŝi diras **karul'**
mi sidas ĉe superlimo
de la kompleta plezur'!
Kiel vera ombro ŝia
estas mi al karulin'
eĉ se mi malproksimiĝu
neniam mankos al ŝi.

3

Min plaĉas virinoj
el ĉiu kolor'
Min plaĉas virinoj
jem mia valor':
Ĉu pola, ĉu latva,

maroka aŭ jida,
usona aŭ rusa,
elekti, angor'!
Ĉu azteka, meteka,
hispana, japana,

alĝera, izraela,
ukraina, sveda,
dana aŭ nikaragva...
Mi ŝatas virinon
por ludi kun mi,

**vivu la virinoj
de ĉiu naci'!**

4

Mi ŝatas virinon,
ho, ve al mi!
min plaĉas virino
el ĉiu meti':
la policistino, advokato,
la kelnerino, aŭ sindikatino;
ĉu verkistino, meĥanikistino,
akuzistino, akuŝistino,
purigistino, oficistino,
laboristino pri ĉiu meti'.

Mi ŝatas virinon,
ho, ve al mi!

**Vivu la virinoj
el ĉiu meti'!**

Barba Bardo



la ĥina, la finna,
argentina, sahrina,
iraka, somala,
tanzana, rumana,
aŭ madagaskara...,
vi venu al mi!
Ĉu toga, ĉu estona,

Depósito legal: Z-2398-88

Presejo: Alegría.